



ADRIÀ GUAL

Mistero de Doloro

DRAMO EN TRI AKTOJ

EL KATALUNA LINGVO TRADUKIS

FREDERIKO PUJULÀ Y VALLÈS



PARIS

LIBRAIRIE HACHETTE et C^{ie}

79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

1909

Tous droits réservés.

PERSONOJ

MARIANO

MARIANETO

SILVESTRO

SEGISMUNDO

FILO LABAST⁽¹⁾

PETRO MALEST⁽²⁾

Kvin Virinoj

Kvin Viroj.

MARIANO : Kvardek-trijara ; freŝa, bruna kaj beltalia. Patrino de Marianeto. Mastrino de la domo, kie okazas la dramo. Ŝiaj haroj ĵus ekblankiĝas. La esprimo de ŝia vizaĝo estas lojala kaj plena de vivo. Ŝi estas alloga entute.

MARIANETO : Dudek-dujara ; gracia ; tre delikatajn kvankam firmajn liniojn. Ankaŭ bruna ; tre nigra hararon. Ŝia ekstera aspekto montras ian koncentrigon, kiu prezentas sin ne tiel komunikema, kiel ŝia patrino.

SILVESTRO : Dudek-okjara, atkreska kaj de fortika aspekto. Dua edzo de Mariano. Malgraciaj pezaj movoj. Lia densa hararo ombraŭs lian de la suno brunigitan frunto, kie elkaviĝas liaj grandaj malfermitaj okuloj. Senharan vizaĝon.

SEGISMUNDO : Sepdekjara. Eksinstruisto de vilaĝo en la valo ; vivas apartigita en angulo de la montoj, kie la dramo elvolviĝas, kaj estas malnova amiko de la familio de Mariano. Tute bona homo. Senhara.

FILO LABAST : Dudek-kvinjara ; afektema dando de vilaĝo. Parolas kaj gestas kun multe da zorgo.


PETRO MALEST : Tridekjara ; arbora karbofaristo. Ordinara tipo, kiu montras bonan fundon.

VIROJ kaj VIRINOJ de la lastaj scenoj. Enlandanoj.

(1) Legu : *Labast'*.

(2) Legu : *Malest'*.

SCENEJO



Sur la alta montaro kataluna.

Ekstera flanko de la domo de Mariano.

Fotografajo de la dekoracio pentrita de S-roj MORAĞAS kaj ALABMA,
el Barcelono.

MISTERO DE DOLORO

AKTO UNUA

Tagmezo de vendredo dum la monato Aŭgusto. Blua kaj hela ĉielo. La suno lumas kun forto. MARIANETO, kantaŭte la kanzonon (Marianeto'n) aperas, venante de la maldekstra pordo kun malplena sitelo, kiun ŝi iras plenigi en la kontraŭa puto.

Kiam ŝi rekantas la duan strofon de la kanzono, oni aŭdas de la dekstra flanko de la fundo similan ariou, kiu alproksimiĝas iom post iom, sekvante la voĉon de Marianeto. Tio estas SILVESTRO, kiu antaŭeniras. MARIANO, de la internajo, aŭdis sian edzon, kaj ridetante rapide eliras kun petola mieno. Kiam ŝi estas eliranta, ŝia flino vidas ŝin, kaj ŝi ne kantas plu. La patrino, ĉiam ridante, faras al ŝi signalon, ke ŝi silentu, kaj ŝi iras al la pordo de la doma ĉirkaŭmuro, kie ŝi kaŝetas sin por surprizi Silvestron, tuj kiam li alvenos. Marianeto, kun la jam plenigita sitelo, reiras tien, de kie ŝi venis. Mariano, kun la deziro pli bone prosperigi tion, kion elpensas ŝia kapo, rapide prenas plenmanon da maizo el amaso, kiu estas tere ĵetita, kaj restas ankoraŭ, atendante la eniron de Silvestro, kiu ne interrompis la kantadon, kaj kiu aperas ankaŭ fajfante, kun la laboriloj sur la ŝultro, la kapo nekovrita, la manikoj suprenalditaj kaj piedvestita per galoŝoj.

Apenaŭ kiam li faris paŝon en la korton, kaj dum li ŝajne volas serĉi, kie enfermiĝis la voĉo, kiu inspiris al li la kanton, lia edzino Mariano, ne povante plu sin deteni, kaj pro la impulso de nerva petolemo, ĵetas al lia vizaĝo la maizon, kiun ŝi gardis en la pugno, kaj ŝi eksplodigas ridadon kaj iras forkurante al la antaŭa parto de la scenejo. Silvestro, surprizita de la neatendita atako, ĵetas la laborilojn teren, kaj eligante la piedojn el la galoŝoj, kaj ankaŭ ridante, persekutas sian edzinon, kiun li tuj kaptas, kaj subite prenante ŝin, li diras :

SILVESTRO

Vi ja vidos, vi !

MARIANO

Nu, diablo ! Vi doloras min. Min lasu.

SILVESTRO (ĉiam tenante ŝin).

Vi devas pagi al mi tiun ŝercon, ĉu vi aŭdas?

MARIANO

Vi doloras min!

SILVESTRO (metante la manojn sur ŝian kolon)

Kaj, se mi sufokus vin, kion vi dirus? (Paŭzo. — Ambaŭ estas tere.)

MARIANO (admire rigardante lin)

Ĉu vi amas min?

SILVESTRO

Multege!

MARIANO

Ne! ĉu ne?

SILVESTRO

Kiu diras tion?

MARIANO

Ne tiel, kiel mi. (Altirante liajn manojn rec ĉirkaŭ sian kolon) Jen : sufoku min!

SILVESTRO

Kion vi vetas, kaj mi faros?

MARIANO

Iru, do.

SILVESTRO

Atentu, ke mi faros.

MARIANO

Iru, do, iru! (Ili sin rigardas ridante unu al la alia. Ŝi forte ridas, kaj fine ŝi prenas lin per la kolo kisante kaj dirante al li:) Mi estas, kiu sufokus vin. Jen, jen, jen!

MARIANETO (elirante el la domo kaj irante al la stalo
antaŭ la malalta fenestro)

Malsprituloj ! (Ŝi malaperas. — Paŭzo. — Mariano kaj Silvestro delasas sin reciproke).

MARIANO (starigante)

Ni atentu ! Pasas la maljunulino... Malsprituloj ! Ĉu vi ne aŭdis ŝin ?... Malsprituloj !... Ŝi ja akiras tian genion, tiu diabla knabino, ke... (Silvestro nenion diras kaj malkontente rigardas teren) (Paŭzo) Ĉu vi opinias ?

SILVESTRO

Ne !

MARIANO

Ĉu mi ne estas prava ?

SILVESTRO

Tio dependas de la lunoj.

MARIANO

Jen nun io alia ! De kie vi venas nun kun la lunoj ? Mi jam forgesis, ke vi ĉiam estas preta defendi ŝin ; ĉu, eble, vi juĝas min malsprita ? Ni vidu, venu, rigardu min. (Alproksimiĝante al li.) Ĉiuokaze vi parolu al mi sincere, ĉu vi aŭdas ?

SILVESTRO (kvazaŭ devige)

Ne, mi, kio ?

MARIANO

Se vi partoprenas la opinion de la ĉirkaŭaĵo, mi estos la unua, kiu diros al vi : for ! Ĉar mi ne estas facilmora, kiel oni diras. Kaj vi bone tion scias, ĉu ne ? (Ĉirkaŭprenante lin) Diru tion al mi ; diru tion al mi.

SILVESTRO

Nu ! Kio kaptas vin nun ?

MARIANO

Ĉu ne, vi ne juĝas min tiel? Ĉu ne, vi scias, ke mi ĉion ĉi faras tial, ke mi amas vin multe, multe; kaj ke tiuj estas la malsprituloj kaj la senpensemuloj, kiuj nomas min la vidvinaĉo? Ĉu ne? Diru tion al mi.

SILVESTRO (kiel antaŭe)

Jes, jes, ili estas la malsprituloj, ili estas.

MARIANO

Vi diras tion tiamaniere, ke...

SILVESTRO

Kiel do vi volas, ke mi diru?

MARIANO

Mi ne scias, sed ŝajnas al mi, ke vi nur pravigas min por min kontentigi.

SILVESTRO

Ĉiam, nur ŝajnas al vi!

MARIANO

Ĉu ne, vi amas min?

SILVESTRO

Jes, jes, kaj jes.

MARIANO

Vi jesis tri fojojn, kaj ankoraŭ ŝajnas al mi malmulte.

SILVESTRO (donante al ŝi karesan bateton)

Friandemulino!

MARIANO

... Kaj ne kredu; vidu: la genio, kiun akiradas Marianeto, ofte priokupas min.

SILVESTRO

Bah? tio ne valoras la penon!...

MARIANO

Kaj, ĉu vi scias, kio eble pli bone konvenus al ŝi?

SILVESTRO

Kio?

MARIANO

Edzinigi ŝin.

SILVESTRO

Antaŭen do!

MARIANO

Kaj rapide, estas necese fari tion. Kion vi vetas, ke ŝi tute ne suspektas, kion al ŝi mi aranĝas?

SILVESTRO

Kion vi aranĝas?

MARIANO

Ĉu vi scias, ke jam de longe la filo Labast ŝin serĉas?

SILVESTRO

Jes...

MARIANO

Kaj eĉ, ke ŝi ne estas tro rifuzema?

SILVESTRO

Ĉu vi kredas?

MARIANO

Kompreneble, mi kredas. Sufiĉe bone mi tion rimarkis, ne antaŭ unu jaro, en la tago de la festo de Sankta Dimo, kiam ŝi dancis kun li.

Kaj ofte ŝi ruĝigadis pli ol la papavoj. Imagu do, kion li diradis al ŝi, li, kiu estas tiel afekta; kaj Segismundo ankaŭ rimarkis.

SILVESTRO

Ĉu, de post tiu tago, vi nenion plu vidis?

MARIANO

Jes... sankta kristano. Ili renkontiĝas, ne sciante nek volante tion; la kruroj perŝitas ilin, kiel diras S-ro Paroĥestro de Miravalaso.

SILVESTRO

Sed, ĉu vi kredas, ke ŝi havas inklinon al Labast.

MARIANO

Eble ŝi ne vidas tion ĉi sufiĉe klare ankoraŭ, kaj tial, ke de post kelke da tempo mi vidas ŝin tiel malbonhumora, mi volas, por plej bona kuracado, donaci al ŝi amindumanton.

SILVESTRO

Certiĝu antaŭe.

MARIANO

Ne estas necese, mi ne estas infanino, kaj, krom tio, patrino ĉiam scias duoble pli, ol sia filino, pri amaj aferoj.

SILVESTRO

Ni vidos, ni vidos.

MARIANO

Kion signifas « ni vidos »? Jam estas vidite.

SILVESTRO

Kial?

MARIANO

Tial ke hieraŭ mi renkontis filon Labast, kaj kvankam tio povos ŝajni al vi revo, li estos via bofilo.

SILVESTRO

Ĉu vi parolis pri tio ?

MARIANO

Jes, tute klare kaj sincere.

SILVESTRO

Kaj ĉu li konsentas ?

MARIANO

Li nur tion atendis.

SILVESTRO

Sed ŝi ?

MARIANO

Simplulo ! ŝi, eĉ sen rimarko tion atendas, kaj vi vidos, kiun rondan jeson ŝi elparolos, kiam ni sciiĝos ŝin.

SILVESTRO

Kaj se vi erarus ?

MARIANO

Iru do. Vi ! Kial mi erarus ?

SILVESTRO

Sed kiel vi vin aranĝis ? Ni vidu. Almenaŭ vi ne fuŝis ? Atentu, ke tiu knabo estas tre afekta, ke eble li akceptis vian proponon nur por sin montri kiel korkaptisto. Tion ĉi, mi ja ne permesus.

MARIANO

Komprenoble, ĉar mi estas tiel facilmora, ĉu ne ?

SILVESTRO

Ree al ni !

MARIANO

Jen, nenion volu scii pri la afero, kaj lasu min agi ; aliflanke, estas necese, ke ŝi edziniĝu ; ŝi havas jam la aĝon. Mi tuj diros al ŝi tion, kio estas necesa, kaj tiam vi vidos, ĉu mi eraras aŭ ne.

SILVESTRO

Bone, do.

MARIANO

Kaj, kiam ŝi estos edzinigita, kiu estos pli feliĉa, ol ni
 Ni vivos ankoraŭ pli ĝojaj; ni scios ŝin provizita por la tuta
 vivo... kaj ankoraŭ ni estos pli solaj kaj pli intime, ol nun.
 (Tre karesema kaj preskaŭ ĉirkaŭprenante lin.) Ĉu ne? (Paŭzo.)

SILVESTRO (malbonhumore)

Ŝajnas, ke ŝi ĝenas vin... Malfeliĉa Marianeto!

MARIANO (de lasante lin)

Kaj vi ŝajnas la patro de la duboj! Kelkajn fojojn vi kolerigas
 min per viaj respondoj!

SILVESTRO

Sed kial?

MARIANO

Jes, jes; vi kolerigas min tiel, kiel mi diris. Vi neniam kon-
 sentas kun tio, kion mi diras al vi... kaj kiam mi pensas, ke
 sufiĉas, ke vi malfermu la buŝon, por ke mi trovu bona ĉion,
 kion vi diras!...

SILVESTRO

Estas, ke...

MARIANO

Estas, ke vi ne amas min tiel, kiel mi vin amas, vi, sen-
 danka!...

SILVESTRO

Mariano!...

MARIANO

Ne, ne, vi ne meritas virinon, kiel min, kiu nur vivas por vi,
 kiu malestimas kaj malestimis kaj malestimos ĉion, kion oni pri
 ŝi rakontas; ĉar, kiam mi por la dua fojo edzinigis, mi estis

Ĥanĉino, kiel neniam antaŭe mi estis; ĉar mi estas freneza... jes, freneza; certe, ami tiel estas frenezaĵo.

SILVESTRO

Aŭskultu, venu !...

MARIANO

Iru. Mi ne volas aŭdi vin ! (Paŭzo. — Ŝi apartiĝas.)

SILVESTRO

Oni ne povas paroli kun vi, jen !

MARIANO

Mi jam tion sciis. (Paŭzo.)

SILVESTRO (tendre alproksimiĝante al ŝi)

Kiel estas eble, ke vi pensas, ke mi ne amas vin? Ĉu mi estus lasinte mian familion, kiel mi faris, se mi ne multe amas vin? Ĉu mi estus tion farinta, se estus certa tio, kion vi diras? Respondu! Mi ankaŭ malestimas tion, kion oni diras, kaj pli ol vi, ĉu vi aŭdas? Kelkajn fojojn mi devas rekomendi min al Dio por ne dispecigi per pugnoĉatoj tiujn, kiuj malbone parolas pri vi!

MARIANO (kun eksplodo kaj prenante al li manon)

Ho! ne Silvestro, mia Silvestro, lasu ilin, ĉu vi aŭdas?

SILVESTRO

Sed vi estas ŝargita de priokupoj!

MARIANO

Jes, jes, jes, mi kredas vin, Silvestro, mi kredas vin. Vi amas min multe, ĉu ne?

SILVESTRO

Kompreneble, jes; kaj vi ankoraŭ...

MARIANO

Bone, ne rimarku. Silvestro, ĉiam ŝajnas al mia deziro, ke vi amas min malmulte.

SILVESTRO

Se mi ne amus vin, ja ni estus bone aranĝitaj !... Oni tiel ofte siblas en miajn orelojn....

MARIANO

Kiu ? Kion oni diras al vi ?

SILVESTRO

Ho ! estas indiferece !... Sed mi ridas pri ĉio !...

MARIANO (ekscitigante)

Kaj ĉion vi forgesas, kiam vi vidas min, ne vere ?

SILVESTRO

Kompreneble !...

MARIANO

Kaj vi kompatas la babilemulojn, kiam mi hejme dorlotas vin, kiel infanon, kaj kiam ni kune forgesas la tutan mondon, atendante la morgaŭan tagon, ... diru ?

SILVESTRO (kontente ridante kaj ĉirkaŭprenante ŝin)

Mariano !...

MARIANO (kisante lin)

Mia knabo ! Jen, jen !

SILVESTRO (kvazaŭ timante, ke ili estu viditaj)

Kion vi faras ?

MARIANO

Estas al mi egale, se oni vidas nin, ĉar mi volus vin mortigi per karesoj antaŭ ĉiuj, kiuj fiparolas !...

SILVESTRO

Via filino povas alveni.

MARIANO

Kaj kio ? Sed ne, certe, malfeliĉa knabino ! Vi ja estas prava. Eble ŝi ne povas kompreni tion, kaj, ĉu vi vidas ? Estas pro tio, ke mi volas, kaj ke estas necese parigi ŝin baldaŭ ; jes, jes, ŝi jam havas la aĝon, kredu min, kredu, kaj lasu min agi. Vi vidos, ke mi ne eraras. Jen : tuj kiam mi vidos ŝin, mi diros al ŝi. Rilate al filo Labast, li venos hodiaŭ aŭ morgaŭ por ion scii.

SILVESTRO

Ĝis tie vi jam alvenis ?

MARIANO.

Ĉu vi kredas, ke mi dormas ? Mi volas igi ŝin feliĉa, Silvestro, kaj ŝi estos feliĉa ; ŝi estos kun li. Plie, li ne estas senpoŝulo. La bienoj de lia patro farigos ŝiaj.

SILVESTRO

Tio ĉi...

MARIANO

Tio ĉi okazos tute, kiel mi diras al vi.

SILVESTRO

Mi dezirus ankaŭ vidi, kie vere estas tiuj ĉi bienoj.

MARIANO

En « Ginestrals » (1) ĉe la flanko de la « Roquera » (2) ; ĉiu tion scias.

SILVESTRO

Bone, bone ; sed mi suspektas, ke estas proceso pri ili.

MARIANO

Kaj eĉ, se tio estus vera, li estas bona knabo, kaj tio sufiĉas.

(1) Legu : *Ginestrals*.

(2) Legu : *Rukera*.

SILVESTRO

Bone. (Paŭzeto.)

MARIANO

Kaj... jen, ĉu vi povus diri, kial al mi multe plaĉus edzinigi ŝin ?

SILVESTRO

Vere ne.

MARIANO (multe ridante)

Por la plezuro, vidi vin avo.

SILVESTRO

Simplulino !

MARIANO

Jes, jes ; maljuna kaj tre maljuna. Nu !... Kia honto !...

SILVESTRO

Ha, vi, vi !

MARIANO

Fi ! la maljunulo !

SILVESTRO

Sed hodiaŭ, ĉu ni nenion devas manĝi ?

MARIANO

Ĉu la infaneto de la hejmo havas apetiton ?

SILVESTRO

Ŝajnas al mi.

MARIANO

Ĉio estas preta, kaj la patrino donos al vi peceton, ĉu ne ?

(Marianeto venas de la stalo kun antaŭtuko' da herbo, kaj ĉiam, malbonhumore, ŝi iras al la pordo de la domo. Ŝi haltas aŭdinte Silvestron.)

SILVESTRO (al Marianeto)

Ŝi diras, ke la manĝaĵo estas preta, Marianeto.

MARIANETO

Jes, kiam vi volos, mi formetos la kuirpoton de la fajro.

SILVESTRO

Laŭ mi, [faru tuj. Hodiaŭ posttagmeze, mi iros kun Peĉjo elfalĉi herbaĉon sur la kampo de « Florest » (1).

MARIANETO

Venu, do ! (Ŝi ckiras.)

MARIANO (rigardinte Marianeton tre atente, haltigante ŝin kaj tre afable)

Aŭdu !

MARIANETO (malafable)

Kion vi volas ?

MARIANO

Ĉu ne plaĉus al vi, se via patrino servus al vi la desertojn, kvankam hodiaŭ ne estas la ĉefa festo ?

(Silvestro iras al la fundo malrapide. Paŭzo.)

MARIANETO (ĉiam malafable)

Mi ne komprenas vin.

MARIANO

Venu ; alproksimiĝu. Lasu tiun herbaĉon.

MARIANETO (lasante la herbon sur la apudan al la porde ŝtonbenkon kaj alproksimigante senplaĉe al sia patrino)

Kio okazas ? Pri kiaj desertoj vi parolas ?

MARIANO (prenante manon al ŝi)

Ne estu tiel serioza. Ha, ha ! Tiu ĉi kapo, tiu ĉi kapo !

(1) Legu : *Flurest'*.

(Al Silvestro :) Kion vi vetas, ke ŝi tute ne pensas pri tio, kion mi aranĝis por ŝi ?

(Silvestro malstreĉas la ŝultrojn.)

MARIANETO

Nu ! Kion vi volas ?

MARIANO

Diru : ĉu ne, vi kredas, ke via patrino amas multe vin ?

MARIANETO

Vi ĉiam venas al mi kun historioj !

MARIANO

Respondu al mi !

MARIANETO

Bone... jes.

MARIANO

Do, diru al mi la veron : ĉu ne plaĉas al vi multe filo Labast ?

MARIANETO (surprizita)

Ĉu estis tio, kion vi volis diri al mi ?

MARIANO

Kompreneble, ĉar tio estas la vero, sed vi ne kuragigas konfesi ĝin.

MARIANETO

Nu ! kiel malmulte da laboro vi havas !... Bah !... (Ŝi denove ekforiras.)

MARIANO (haltigante ŝin per la mano)

Kial vi estas tiel ? Mi volas, ke vi diru al mi la veron !

MARIANETO

Sed kian veron ?

MARIANO

Ke Labast plačas al vi.

MARIANETO

Eĉ mi ne scias, kiun mienon li havas. Jen do, kiel vi trafas.

(Silvestro atentis ĉion kun granda intereso, kiun li kaŝas, kiam Mariano rigardas lin. Marianeto ĉiam atentis la okulojn de sia duonpatro.)

MARIANO

Do, mi parolos anstataŭ vi, jen; kaj tial, ke mi konas vin sufiĉe, kaj mi scias, kiel silentema vi estas, kaj mi volas, ke vi estu tre feliĉa, mi faris la laboron, kiun vi ne faris. Vi nun jam scias!

MARIANETO

Kion vi traparolas? Kion vi faris? (Ŝi ekscitiĝas iom post iom.)

MARIANO (ridante; al Silvestro)

Ha! kiel ŝi koleras. Rigardu ŝin! Nu! Ni ja scias, kio estas, kio tiklas la koron.

MARIANETO (kun ataka tono)

Sed mi ne scias nek volas scii; ĉu vi komprenas? Kaj kion ajn vi estas farinta, vi malbone agis, nenion dirante antaŭe. Mi nenion volas aŭdi pri filo Labast; nek pri li, nek pri alia. Jam estas dirite; kaj, se iam mi deziras edziniĝi, mi mem jam sufiĉas por aranĝi la aferon.

MARIANO (al Silvestro)

Ĉu vi ne aŭdas ŝin?

MARIANETO

Ĉiu ajn povus pensi, ke mi havas malsaton al edziniĝo...!

MARIANO

Sed, kial vi mensogas al mi, diru?

MARIANETO

Mi ne mensogas !

MARIANO (al Silvestro)

Ŝi diras, ke ŝi ne mensogas, kaj antaŭ kvar tagoj mi trovis, en la kesto de la supra etaĝo, la faskon da ĉifonitaj papavoj de la danco, kiun ili dancis en festo !

MARIANETO

Ne estas tro laŭdinda la kaŝobservado !

MARIANO

Senhonta !

MARIANETO

Vi serĉu nun la faskon.

MARIANO

Vi scias, kie ĝi estas.

MARIANETO

Kaj pri la porkidoj ankaŭ mi scias !

MARIANO

Mi ne scias, kion mi farus al ŝi !...

MARIANETO

Faru, kion vi volos.

SILVESTRO

Nu ! sufiĉe !

MARIANO

Sed, ĉu vi ne aŭdis ŝin ?

SILVESTRO

Jes, bone, nu !

MARIANO

Kompreneble, jes, bone, kompreneble, ŝi estas prava, ĉu ne ?

MARIANETO

Ne ; vi estas prava, se vi volas.

MARIANO

Silentu fine !

MARIANETO

Kaj estos tre bona ĉio, kio okazos al vi nun. Vi ja renkontos ĉe Labast grandan malspritulon ; mi avizas vin.

MARIANO

Unu bonigas la alian !

MARIANETO

Des pli bone !

MARIANO

Eble vi intencas resti ĉiama fraŭlino ?

MARIANETO

Eble, jes.

SILVESTRO

Sufiĉe, mi diris ! (Al Mariano) Lasu ŝin trankvila ; ke ŝi faru, kio plaĉos al ŝi. Nenion perforte, mia kara...

MARIANETO

Edziniĝi... mi !

MARIANO

Kompreneble, la malŝatantino ! KREDU DO, ke vi restos tre ridinda por la najbaroj.

MARIANETO (haltante ĉe la sojlo de la pordo)

Kaj tio ĉi kial, se la demando ne estas maldiskreta ?

MARIANO

Vi mem povas diri ! (Ironie) Oni neniam vidis vin parolantan kun li.

MARIANETO

Eble ni devas mutiĝi, kiam oni parolas al ni ! Sed mi opinias, ke de parolo ĝis edziniĝo estas granda distanco ! Kaj fine, mi ne amas lin, kaj ne plu parolu al mi pri li. Jen ĉio !

MARIANO

Kaj ĉu mi devos repreni de li mian promeson ?

MARIANETO

Vi devus iom pli zorgi, antaŭ ol ion promesi.

MARIANO

Nu ! Kiam mi povos scii, de kiu flanko oni devas preni vin !...

MARIANETO

Tiam, vi ja estos farinta grandan progreson.

MARIANO

Vi estas vere la filino de via patro !

SILVESTRO

Kion vi diras ?

MARIANO

Nenion, nenion ! (Paŭzo.)

SILVESTRO

Lasu ŝin, obeu. (Paŭzo.)

MARIANO

Kaj kiamaniere mi kondutos nun kun Labast ? Kiu ne pensus, ke ŝi nur tion atendis ?

SILVESTRO

Mi jam diris al vi...

MARIANO

Kion vi diris ?

SILVESTRO

Ke vi devis multe zorgi.

MARIANO

Jes, nun, kiam vi vidas la aferon difektita...

SILVESTRO

Mi devas diri la aferojn tiel, kiel mi ilin pensas. Vi agis kun bona intenco, jes, mi scias, kaj vi ne estas devigata pruvi tion al mi ; sed estas necese multe zorgi pri tiuj ĉi aferoj. Ŝi estas juna ; do, ne strange, ke ŝi hodiaŭ pensas alimaniere, ol hieraŭ.

(Oni vidas Marianeton malantaŭ la fenestro aranĝantan teleron sur la tablo kaj pretigantan la manĝaĵon.)

MARIANO

Vi parolas, kiel majstro.

SILVESTRO

Mi parolas, kiel mi povas.

MARIANO

Jes, bone ; sed okazas, kion mi jam diris al vi, ke, kiam vi povas pravigi ŝin, vi jam estas kontenta.

SILVESTRO

Mi ne estas viro, kiu povas pravigi tiun, kiu tion ne meritas.

MARIANO

Jes, jes, parolu al mi tre klare, kompreneble ; sed ne vi eliros min el la marĉo, en kiun mi falis. Mi ja suspektas, ke mi mem devos min arangi !

SILVESTRO

Tion vi diras, kaj vi ankaŭ tro pretendas. Mi kredas, ke mi tamen estas io ĉi tie ! (Paŭzo.)

MARIANO

Kaj kion mi diros al li ? Ni vidu !

SILVESTRO

La veron.

MARIANETO (kiu aŭdas ilin, malfermas la fenestron)

Mi mem diros al li la veron, kaj tre klaran. Ne turmentu vin pro tio ; mi lasos vin en bona situacio.

MARIANO

Miraklo !

MARIANETO

Ĝi do estos la unna, kiun vi vidos, kaj ne tro malfrue.

SILVESTRO

Ĉu vi intencas iri renkonti lin ?

MARIANO

Ŝi faru, kion ŝi volos.

MARIANETO

Ne necese ; pasante nun ĉe la pordo mi vidis lin supreniranta la deklivon ; eble li venas repreni la bukodon el floroj.... kaj li forportos dornojn.... Mi tion ĵuras je tiu ĉi suno....

MARIANO (sin turninte al la pordo de la ekstera muro)

Ĉu li venas ?

SILVESTRO (ne moviĝante, kaj por si mem)

Venas ?

MARIANETO (lasinte la fenestron kaj ĉe la pordo)

Jes, lasu lin al mi.

MARIANO

Ne, ne, mi mem devas paroli al li! Vi estas pravaj, mi devas suferi la sekvojn; ĝi estas mia kulpo.

MARIANETO

Mi finos pli rapide.

SILVESTRO

Ne, nek unu, nek la alia. Eniru ambaŭ. Mi diros al li tion, kio taŭgas por la okazo.

MARIANETO

Ĉu vi?

MARIANO

Dio ne permesu, ke mi lasu vin sola; mi sufiĉe konas vian karakteron.

SILVESTRO

Ambaŭ eniru, mi diras.

MARIANO (sidiĝante sur la apudan al la fenestro benkon)

Jen... nek perforte.

SILVESTRO

Do atentu, ne malfermi la buŝon.

MARIANO

Vi, pli ol mi, devas atenti.

SILVESTRO (al Marianeto)

Vi eniru, vi!

MARIANETO (petege kaj rigardante lin dum ŝi foriras)

Mi konfidas je vi, Silvestro.

SILVESTRO

Iru, iru !

(Marianeto foriras ; oni vidas ŝin laborantan malantaŭ la fenestro por aŭdi ĉion.)

MARIANO (pri ŝi kaj nerve)

Mi certe havos sperton alian fojon. (Paŭzo.)

SILVESTRO

Jen, li, ĉi tie.

(Filo LABAST aperas ĉe la pordo de la ĉirkaŭmuro kun triumfa kaj afekta mieno. Li tenas per la mano vergeton aŭ branĉeton. Li tuj haltas, enirinte, kvazaŭ serĉante iun, kaj vidinte Silvestron li diras:)

LABAST

Bonan tagon, mastro.

SILVESTRO

Bonan tagon, junulo ; ĉu vi jam tagmanĝis ?

LABAST

Ne ankoraŭ ; nun mi iras.... Kaj vi ?

SILVESTRO

Ni estas irontaj.

LABAST

Ĉu mi ĝenas vin ?

SILVESTRO

Ne, tute ne. (Paŭzo.)

LABAST

Ĉu Mariano ne estas ĉi tie ?

SILVESTRO

Jen ŝi. (Li montras.)

LABAST

Ja ! Mi tute ne vidis ŝin.

MARIANO (nevolonte)

Bonan tagon.

LABAST

Dio gardu vin ! (Paŭzo.) Jen, vi vidas... Tio ĉi estas rapidi, ĉu ne ? Mi ne povis reiri hejmen, ne veninte ĉi tien. Mi intencis atendi ĝis morgaŭ por vidi vin, kaj mi ne prosperis tion fari. (Al Silvestro :) Via edzino kaj mi aranĝas aferon.

SILVESTRO

Jes, ŝi jam diris al mi ion pri tio.

LABAST

Ĉu vi diris al li ? Tio estas bona.

SILVESTRO

Ni preparolis antaŭ ne longe. (Al Mariano) Ĉu ne ?

MARIANO

Jes. (Paŭzo.)

LABAST

Kaj... kion ? (Paŭzeto.)

SILVESTRO

Vidu, Labast. Preferinde estas, paroli al vi sincere.

LABAST

Kio okazas ? (Paŭzo.)

SILVESTRO

Ŝajnas, ke Marianeto ne alkonsentas.

LABAST (al Mariano kun surprizo kaj preskaŭ atako)

Ĉu vere ?

MARIANO

Vere, kiel diris mia edzo.

SILVESTRO

Jen, tiel estas.

LABAST

Kaj kun tio ĉi vi venas al mi nun ?

SILVESTRO

Ne estas afero nia.

LABAST (laŭtigante la voĉon)

Kiu do dirigis al mi, kion vi diris ? Ĉu okaze mi demandis vin ?

SILVESTRO

Nu, mia kara, ne krii.

LABAST

Mi parolas al via edzino.

SILVESTRO

Vi eraras, vi parolas al mi.

LABAST

Tiamaniere oni facile povas fari ĉion ajn. Mi interkonsentiĝis kun ŝi mem, ke ŝi mem diru....

MARIANO (stariĝinte)

Jes, vi interkonsentiĝis kun mi, mi bone scias. Sed kion vi volas, ke mi diru al vi nun ? Oni diras, ke mi eraris ; jen ĉio.

LABAST

Ni certe fuŝis ! Ĉu oni rajtas, tiamaniere ludi kun la homoj ? Hodiaŭ jes, morgaŭ ne, kaj poste, ĉiu ridu laŭ sia volo ! (Kun malkontento.)

SILVESTRO

Neniu diris al vi, jes.

LABAST (ironie)

Pardonu ! Mi ne rimarkis, ke vi estis kun ni, kiam ni interparolis.

MARIANO

Kion diras Silvestro, estas la vero. Mi diris al vi, ke laŭ mia opinio, jes ; kaj ke ŝajnis al mi, ke Marianeto volas, kaj ke mi celos por certe scii pri la afero.

SILVESTRO

Jen kion ŝi diris al vi.

LABAST

Bone, bone !... Sed, ĉu vi kredas, ke mi tiel foriros, kontentigita kiel bubo, kaj kvazaŭ nenio estus okazinta ?

SILVESTRO

Vi diros do, kiamaniere vi volas foriri.

LABAST

Certe mi diros.

SILVESTRO

Ni vidu !

MARIANO (senpacience)

Pro Dio !

LABAST

Ne havu timon !

SILVESTRO

Ho, certe. (Paŭzo.)

LABAST (aŭtoritate)

Mi volas, ke Marianeto mem diru tion al mi.

MARIANETO (tion aŭdinte kaj rapide aperinte ĉe la fenestro)

Se nur tio mankas al vi, vi estos baldaŭ servita. (Tre energie:)
Ne... jen!

SILVESTRO (nergie)

Ne venu tien, kien oni ne vokis vin!

MARIANETO

Oni ne vokis min, vi diras?

MARIANO (maltrankvile)

Eniru!

SILVESTRO (nergie)

Eniru, vi!

LABAST

Ne plu klopodu; mi jam vidas, ke vi ĉiuj estas bone kun-
jurintaj! Plaĉas al mi la aferoj, klaraj kaj tre klaraj. Vi vere
povas esti fieraj, ke tio ĉi estas la unua fojo, kiam okazas simila
afero al filo Labast..., kaj li ne forgesos.

SILVESTRO

Kion vi intencas diri?

LABAST

Ke mi ne forgesos; estas dirite, kaj ke se vi kredas, ke mi
restos silenta, por ke la ĉikano mordu min, vi eraras, vi tute
eraras.

MARIANO

Mi agis kun bona intenco.

LABAST

Kompreneble!

SILVESTRO

Sufiĉas al mi, tion scii.

LABAST

Mi zorgos rakontadi la aferon ĉie.

SILVESTRO

Sed vi atentu ne aldoni ion ajn necertan.

LABAST (tre laŭte)

Neniam iu ajn diris al mi mensogulo !

SILVESTRO

Nek mi tion diras al vi nun.

MARIANO (maltrankvile)

Pro Dio, Silvestro !

SILVESTRO

Lasu lin, mia kara.

MARIANETO

Ne plu diru ion al li. Li jam scias, kion li bezonas.

LABAST

Vi mem ankoraŭ ne scias ĉion ; kaj al vi mi parolas, mastro, por ke vi memoru.

SILVESTRO (dezirante alproksimiĝi al li)

Kion vi volas diri, ni vidu ?

MARIANO (prenante al li manon)

Lasu lin !

MARIANETO (prenante lian alian manon)

Lasu !

LABAST (kolere ridante)

Ne timu ; mi ja ne mangos lin !

SILVESTRO

Vi multe devus peni !

MARIANO

Silentu !

MARIANETO

Kaj vi, foriru !

LABAST

Mi foriros, sed antaŭe aŭdu min, kaj vi « atentu » vian neston !

SILVESTRO (ekster si mem)

Kion ?

MARIANO (energie)

For de tie ĉi !

LABAST

Zorgu, ke via edzino pripensu, antaŭ ol diri ion ajn, ĉar ŝi jam havas famon disĵeti ĉien vortojn.

SILVESTRO

Ĉikanemulo !

MARIANO

Surdigu, Silvestro.

LABAST

Kaj zorgu, ke via duonfilino ne faru same, kaj ke ŝi ne komencu, kion ŝi ne volas fini.

MARIANETO (surprizita kaj indignita)

Kion vi diras nun ?

LABAST

Kaj ke ŝi ne renkontigu tiel ofte kun la fraŭloj, dum la vesperoj, kaj... mi scias, kion mi diras.

MARIANETO

Min renkontas, kiu min serĉas, ĉu vi komprenas ?

LABAST

Komprenite.

SILVESTRO (ĉiam tenita de ili)

Se vi ne foriras, mi batos vin !

LABAST (moke ridante)

Ĉu vi ne vidas, ke ili vin tenas ?

SILVESTRO

Ke ili min tenas ? (Li baraktas por liberiĝi ; ili penas kaj prosperas reteni lin.)

MARIANO

Restu !

MARIANETO

Silvestro !

MARIANO

Ne lasu lin, mia filino.

LABAST (ridante kaj irante al la pordo)

Tio estas la sola afero, kiu mankis al mia vido. Vi ja povas diri, ke vi trovis tion, kion vi bezonis : kelkajn ormonerojn en angulo de ŝranko, edzinon, kiu povas esti via patrino... kaj Dio donacos al vi la ceteron.

MARIANO

Malbona homo.

MARIANETO

Vi ja dezirus por vi, tiujn ormonerojn !

LABAST

Mi ne bezonas ilin. Mi ne scias, de kie ili venas.

SILVESTRO

Mi forŝiros vian langon. (Baraktas denove.) Lasu min !

MARIANO

Ne.

MARIANETO (al Labast)

Foriru vi, fine !

(Silvestro prosperas liberiĝi, kaj, prenaute stangon, kiun li renkontas pasante, li kuras al Labast.)

SILVESTRO

Malbona bestaĉo !

MARIANETO (sin metinte inter Silvestro kaj Labast,
kiu jam estas apud la ĉirkaŭmura pordo)

Ne ! Iru for !

LABAST

Ni revidos nin !

SILVESTRO (ĉiam baraktante kontraŭ Mariano, kiu denove retenis lin
kaj lin ne lasas)

Nun ; nun !

MARIANO

Pro Dio, Silvestro, pro Dio !

SILVESTRO

Nun, mi diras !

MARIANETO (repuŝante Labast'on eksteren)

Iru for, vi ! (Silvestro liberiĝas de sia edzino ; li kuras al la pordo.)

MARIANETO (fermite la pordon kaj staraute antaŭ Silvestron)

Haltu !

SILVESTRO (kriante, por ke Labast aŭdu lin
de la alia flanko de la muro)

Ni ja revidos nin unu la alian !

MARIANO

Silentu, se eble !

LABAST (de la ekstera flanko ; lia voĉo malproksimiĝas)
Jes, jes, kiam vi volos.

SILVESTRO

Mi dispecigos vin per vangofrapo.

MARIANETO

Silvestro !

MARIANO (al Marianeto)

Ĉio, ĉio pro via kulpo.

MARIANETO

Kompreneble. Mi ja scias.

LABAST (ĉiam malproksimigante)

Adiaŭ, koko sen spronoj ! (Li ridas.)

(Silvestro kolere intencas malfermi la pordon.)

MARIANETO (haltigante lin)

Ne...

SILVESTRO (tre ekscitigita)

Vi trovos... mi... Pse ! (Paŭzo.)

MARIANO

Mi tion ĉi timis.

MARIANETO (enirante en la domon kaj rigardante Silvestron)
Jes, pro mia kulpo !... Estas egale.

SILVESTRO

Malbona bestaĉo ! Jam de longe mi minacas lin...

MARIANO (petege)

Ni eniru, Silvestro !

SILVESTRO (sekvante, nevolonte)

Koko sen spronoj....

MARIANO

Ne plu pensu pri tio. (Paŭzo.)

SILVESTRO

Nu, la tago, kiam vi falos en miajn manojn, ne estos malbonaj la spronoj, kiujn mi igos vin gustumi... (baraktante), kaj eĉ nun....

MARIANO (haltigante lin)

Lasu lin, kiel friponon !

SILVESTRO

Kiel friponon, mi volas lin puni.

MARIANO

Ne plu pri tio pensu, pro Dio. (Paŭzo.)

SILVESTRO

Koko sen spronoj....

MARIANETO (starante ĉe la pordo)

Ĉu vi venas ?

MARIANO

Jes, jes, ni jam venas. (Ŝi prenas lin per la brako, kaj ambaŭ iras al la pordo. Kiam ili estas sur la sojlo, Silvestro haltas kaj restas rigardante al la


ĉirkaŭmura pordo. Mariano enirigas lin ame dirante :) Ni eniru ! Ne pensu plu pri tio. Ĝi ne valoras la penon. (Ili eniras.)

SILVESTRO (enirante)

Koko sen spronoj....

(Oni vidas ilin, kiam ili sidas ĉirkaŭ la tablo, malantaŭ la fenestro. Mariano havas grandan korpremon kaj sekvas liajn movojn per la rigardo. Li ĉiam obstine pensas pri la okazintaĵo. Post ne longe, Marianeto venas kun fumanta kuirpoto, kiun ŝi metas sur la manĝotablon. Ŝi revenas denove al la fundo. Mariano servas, unue al si mem, poste ŝi plenigas la teleron de sia filino, fine ŝi servas al Silvestro. Tiu ĉi rifuzas la teleron, kiun lia edzino proponas al li. Marianeto kaj Silvestro rigardas sin reciproke, kvazaŭ ili ne volus esti rimarkataj. Mariano petas denove Silvestron, ke li manĝu ; li denove rifuzas. Tio ĉi kaŭzas konfuzan dialogon, kies vortojn oni ne precize aŭdas.)

(Kurteno.)



AKTO DUA

Sama loko. Morgaŭna tago. Kvina horo posttagmeze. — La korto estas senhoma ;
post momento, Segismundo, venante de la funda pordo, aperas.

SEGISMUNDO (vidante, ke neniu estas en la korto, kaj ĉien rigardinte,
diras salute :)

Ave Maria! (Paŭzo.)

MARIANO (eligante la kapon tra la supra fenestro)

Kiu estas?

SEGISMUNDO (irante apud la fenestron)

Ĝi estas mi, Mariano.

MARIANO

Segismundo?

SEGISMUNDO

Jes.

MARIANO

Mi malsupreniras. (Ŝi malaperas kaj tuj reaperas, malsuprenirante la
stuparon. Kiam ŝi estas malsupre, ŝi diras nerve :) Vi jam vidas ! . . .

SEGISMUNDO

Nu ! Kio estas tio, kion oni rakontis al mi ?

MARIANO

Kion vi volas, ke ĝi estu ? Ekfajriĝo de juneco, malagrabloj.
Mi eĉ ne scias, kie mi havas la kapon. Kredu min !

SEGISMUNDO

Sed kiel okazis? Rakontu! Mi nenion scias....

MARIANO

Do, vidu: kiel diras la proverbo: ofte oni kredas signi krucon sur la frunton kaj fortiras al si okulon; jen!

SEGISMUNDO

Ĉu ili vere faris al si malbonon?

MARIANO

Ne tro. Silvestro havas skrapon sur la mano, kaj la alia ricevis preskaŭ tiom, kiom li. Sed tio sufiĉas. La plej bedaŭrinda estas la malbono, kiu restos, kaj la kórpremo, kun kiu mi ĉiam vivados.

SEGISMUNDO

Nu! Tamen... ne tiom!

MARIANO

Dio estu kun vi! En tiaj aferoj, ĉio estas la komenco.

SEGISMUNDO

Ĉu hieraŭ, ili disputis?

MARIANO

Jes, hieraŭ, tie ĉi mem, kiam filo Labast venis scii, kion mi jam rakontis al vi. Ĉu vi memoras?

SEGISMUNDO

Jes.

MARIANO

Jam, antaŭ ol li venis, mi havis malpaceton kun mia flino, vidante, ke ŝi prenis alian vojon, laŭ tia maniero, ke eĉ nun mi nenion komprenas; sed tio ĉi estus nenio. Pli malbona estas la sekvo. Kiam venis Labast, kaj li fanfaronis al Silvestro, kaj

ambaŭ prenis la aferon kolere, tiam ĉio pligraviĝis kaj multe pli ankoraŭ hodiaŭ matene, kiam ili renkontiĝis sur la Ebenajo de la Limŝtonoj, kaj ili sin ĉirkaŭprenis reciproke, kiel hundoj. Feliĉe, Roch⁽¹⁾ tie pasis kun la du mulistoj de Comabella⁽²⁾; sen tio, mi kredas, ili estus mortigint¹ sin. (Malgranda paŭzo.) Ve! Segismundo, mi ja povas diri, ke mi venis en la mondon por suferi suferon post sufero!

SEGISMUNDO

La afero ne estas tiel grava. Plej eble post kvar tagoj ili recipaciĝos.

MARIANO

Kiel vi eraras! Kaj des pli malbone, se vi pravas.

SEGISMUNDO

Ni ĉiuj estis junaj, kaj mi scias, kion povas okazigi sangobato ĉe la kapo. Ne estos do strange, se ili repaciĝos. Ĉu vi ne scias, ke filo Labast nur deziras rimarkigi sin, kaj ke tio ĉi ne estas la unua fojo, kiam li troviĝas en simila okazintaĵo? Rilate al Silvestro, li ne estas vengema.

MARIANO

Ho ne, estas vero, sed li havas multe da digneco.

SEGISMUNDO

Tio ĉi igos lin pripensi kaj kompreni, ke pli bone estas fini la aferon tie ĉi.

MARIANO

Dio aŭdu vin. Sed nun la vero estas, ke ni jam havis ĉagrenon. (Paŭzo.) Kaj pri mia filino, kion vi diras?

SEGISMUNDO

Kion vi volas, ke mi diru? Ĉi tio ĉiam estas mistero; tiuj aferoj estas malfacile diveneblaj.

(1) Legu : *Rok*.

(2) Legu : *Komabelja*.

MARIANO

Vi ne tiel opiniis, kiam mi parolis al vi pri tio.

SEGISMUNDO

Mi jam diris : ni ĉiuj estas samaj, Mariano... kaj ni povas esti certaj, nur pri unu afero.

MARIANO

Sed ĉiu pensis, kiel mi ! Kaj ĉiu remaĉis la aferon, kredante esti prava ; kaj ĉio estis pli hela, ol taglumo.

SEGISMUNDO

Jes, jes, ĉio, kion vi volos. La vento ŝanĝiĝas, kiam oni tion ne atendas. (Malgranda paŭzo.)

MARIANO

Kiam vi tiel parolas, mi ĉiam pensas, ke vi parolas pri mi.

SEGISMUNDO

Pri ĉiu, Mariano.

MARIANO

Sed vi ne diras ne.

SEGISMUNDO

Sed ankaŭ mi ne diras jes.

MARIANO

Iom post iom mi rimarkas, ke ĉiuj rigardas min per samaj okuloj.

SEGISMUNDO

Tio ĉi estas priokupoj viaj.

MARIANO

Ne, ne estas priokupoj miaj ; des pli bone, se nur tio estus ! Sed neniu memoras pri la pasintajoj. Ĉiu vidas nur la nunajn aferojn. Mankas multe da kompatato en la mondo, kredu min.

SEGISMUNDO

Cu vi parolas pri mi?

MARIANO

Pri ĉiuj, kaj pri vi.

SEGISMUNDO

Mi kredas, ke mi neniam donis al vi kaŭzon. Mi ĉiam estis en via flanko. Mi ĉiam aŭskultis vin, defendis vin kontraŭ la aliaj; kion mi devis ankoraŭ fari?

MARIANO

Ne atentu mian diron; vi estas prava; ne atentu mian diron.

SEGISMUNDO

Mi vidas, ke vi estas tre elordigita.

MARIANO

Kion mi vidas, estas, ke neniam oni trovas kion oni deziras. Nun, nenio mankus al mi por esti feliĉa, kaj jen, mi ne estas.

SEGISMUNDO

Kiu estas feliĉa en tiu ĉi mondo?

MARIANO

Ĉio ŝajnas al mi punoj, kiuj burĝonas, kaj mi kuraĝas diri, ke mi ilin ne meritas. Ĉu mi estas malbona? Diru al mi.

SEGISMUNDO

Ne.

MARIANO

Tamen mi suferas, kvazaŭ mi estus tia! Neniu volas memori, kio okazis al mi kun la unua edzo, kiun Dio al mi donis. Ĉiuj vidis bone, kaj ĉiuj agas, kvazaŭ ili perdis la memoron! Vi estas la sola, kiu de tempo al tempo diras al mi: vi estas prava!...

La aliaj... nur taŭgas por ofendi min, kaj en tio ili plezurigas! Kion mi faris al ili, ke ili kondukas tiel kontraŭ mi? Vidu: mi ne estas virino, kiu sciis deziri al iu malbonon, sed kiam mi vidas ĉion, kion oni faras al mi, ofte plaĉus al mi pasigi ilin tien, tra kie mi pasis.

SEGISMUNDO

Bah!

MARIANO

Jes, ja; mi scias, ke tio nenion rebonigus al mi.

SEGISMUNDO

Do, ... nu!

MARIANO

Mi multe suferis, Segismundo, multe. Mi kredis jam, ke alvenis la tempo ripozi post tiom da suferado, kaj, ĉar ĉiam unu afero aŭ alia tion malhelpas, mi vidas, ke pli bone estas, ke mi perdu ĉiun esperon! Ĉar vidu: kiu povus esti pli bone, ol mi nun? Kun Silvestro, kiun mi tiel multe amas, kun mia filino, kiun mi tiel amas ankaŭ... Sed ne! la filangoj, fipensoj, ĉio, ĉio agordiĝas por ne lasi min trankvila, kaj, kvazaŭ ĉio ĉi ne sufiĉus, jen la hodiaŭa okazintaĵo! Dio, Dio!...

SEGISMUNDO

Havu trankvilon!

MARIANO

Mi havas. Se mi ne havus, mi ne scias, kie mi finiĝus.

SEGISMUNDO

Kun trankvilo kaj pripensado oni ĉion pasigas en la mondo.

MARIANO

Ĉu vi kuraĝus diri, ke mi ne havis sufiĉe? Vi tion scias pli bone, ol iu alia. Se mi ne estus havinta multe da trankvilo, mi jam estus mortinta, dank' al Dio!

SEGISMUNDO

Tion ĉi neniam oni devas diri.

MARIANO

Sed oni devas pensi.

SEGISMUNDO

Por nenio taŭgas.

MARIANO

Estas same!... Alia en mia loko, mi ja certigas vin, estus aginte alimaniere. Kiam mi memoras ĉion, kio okazis al mi, ĝi ŝajnas al mi sonĝo, ke mi ĉion elportis kun sano kaj kun forto. (Paŭzo.) Ofte, tamen, pasis tra mia kapo la plej malgajaj pensoj; vi bone povas min kredi. Ĉu vi memoras la tempon, kiam mi venadis viziti vin ĉe via lernejo de Valdoncero?

SEGISMUNDO

Sufiĉe bone.

MARIANO

Kiam mi venadis kvietigi mian animon, rakontante al vi la malbonagojn de mia unua edzo, vetludema, fripono, viraĉo, kiu neniam zorgis montri al mi iom da amo; ofte mia kapo turniĝis kaj mi nur pensadis, kiel uni povus fari, por malaperi el la mondo.

SEGISMUNDO

Ĉu pli, ĉu malpli, ĉiu pensis pri tio iafaĵe.

MARIANO

Ho, Segismundo, se mi ne havus la filinon! Kiom da fojoj ŝi haltigis min! Kiam li iradis ĉeesti la festojn de la ĉirkaŭaĵo kun la bando de Romao, kaj li forportadis la monon de la rikolto por ŝovi ĝin sur ludkarton aŭ sur vintrinkilon aŭ... Dio scias ankoraŭ kien, kiom da fojoj Marianeto alkroĉita al mia brusto, retenis min

sur la tero! Mi vivadis malsata de tendreco, tiel malsata, ke eĉ nun, kiam amaso da jaroj forflugis, mi estas la sama: freneza, freneza, kiel ĉiu nomas min!... Estas indiferece... Mi ĉiam suferos ĉion, la plej grandan malbonon kaj la plej grandan teruron en la vivo, sed mi devas esti certa, ke kiam la tago estos finiĝanta, mi trovus apud mi aman festan buŝon. Tio ĉi estas mia frenezeco, tio ĉi! Des pli bone, se ili estus du, kiel nun povus esti! Mi amas Silvestron tiel, ke eĉ mi ne scias, kiel tion diri; neniam mi amis, kiel nun; kaj mi amas mian filinon tiamaniere, ke mi ankaŭ ne scias, kiamaniere mi povus diri tion; ne, mi nescias. Foje, dum la tago mi ĝojas, pensante pri unu el ili; foje, pensante pri la alia; kaj ofte mi deziras endormiĝi apogita kontraŭ ambaŭ. Mi estas freneza, kredu min, mi estas freneza.

SEGISMUNDO

Vi nur estas juna, kaj vi ĉiam estos tia!

MARIANO

Eble tio ĉi estas malbono.

SEGISMUNDO

Eble, kiu scias?

MARIANO

Mi ne volas tion scii. Mi estas tia, mi ne povas esti alimaniere. Vi ne povas kompreni tiujn ĉi aferojn.

SEGISMUNDO

Kial ne?

MARIANO

Vi prosperis fari al vi izolitan vivon.

SEGISMUNDO

Kaj multe kostus al vi eble diveni, de kie venas al mi tiu mia vivmaniero. En la mondo, Mariano, nenion oni faras, nenion.

MARIANO

Tion saman mi diras.

SEGISMUNDO

Do ?

MARIANO

Nu, jes, ni lasu tion ! (Ŝi starigas.) Nun, tio, kion mi deziras, estas trovi rebonigon al la nuna afero, malaperigi ĝin... mi ne scias, kion mi deziras.

SEGISMUNDO

Ne priokupiĝu ; tio ĉi jam estas finita.

MARIANO

Dio volu !

SEGISMUNDO

Finita kaj elfinita. Ili jam forigis de si la furiozon ; ili jam estas sur la vojo al la resaniĝo. La homoj ĉiam agas same. Tiun ĉi saman fakton mi rimarkis mil fojojn ĉe la infanoj, kiam mi estis instruisto. Multaj, kiuj estas amikoj ĝis la morto, komencis per pugnoj ĉe la eliro el la lernejo.

MARIANO

Ne estas same.

SEGISMUNDO

Jes estas same, ne priokupiĝu. Silvestro resaniĝu je la mano, kaj la afero estos flue pasinta.

MARIANO

Sed mi ankoraŭ ne vidas bone, kio okazis. Tiu ĉi fojo ne estas la unua, kiam mi eraras, sed kiel tiun ĉi fojon, neniam, neniam ! Kiu povis ne pensi, ke Marianeto havas inklinon al filo Labast, diru ?

SEGISMUNDO

Nu!...

MARIANO

Kaj kion mi faros kun tiu knabino, se ŝi obstinas, ne volante edzinigi?

SEGISMUNDO

La tempo por ŝi ne pasas, ŝi estas juna.

MARIANO

Ŝi jam havas la aĝon, Segismundo, ŝi havas la aĝon. Ŝi ne povas daŭri tiel; kiam mi havis ŝian aĝon, mi jam estis baldaŭ edziniĝonta.

SEGISMUNDO

Ne ĉiuj estas samaj.

(Oni aŭdas la voĉojn de Silvestro kaj Marianeto, kiuj parolas en la domo.)

MARIANO

Silentu, silentu; ĝi estas li, kiu venas.

SEGISMUNDO

Ĉu li estas ĉi tie?

MARIANO

Jes; li ne povas labori, li havas la manon bandaĝitan.

SEGISMUNDO

Diable!

SILVESTRO (eliras tra la pordo ĉe la supraĵo de la ŝtuparo; lia mano estas bandaĝita. Li parolas al Marianeto, kiu ankoraŭ estas interne)

Lasu tion; jam estas bone tiel. (Malsuprenirante kaj kun malbona humoro.) Sufiĉe da ŝmirajoj!

SEGISMUNDO

Nu, mia kara, ĉu vi iris al milito?

SILVESTRO

Bonan tagon! ... Pse! ... Aferoj, kiuj devas okazi; kion vi volas?

SEGISMUNDO

Nu, nu...

MARIANO

Sed ili jam okazis; ĉu ne, Silvestro?

SILVESTRO (sidiĝante apud la fenestron)

Mi silentas.

MARIANO (al Segismundo)

Ĉu vi vidas?

SEGISMUNDO

Jes, jes, lasu lin diri. Ĉio jam pasis nun.

SILVESTRO (pli enfermita en si mem)

Mi... silentas.

MARIANO

Ĉu tio doloras vin?

SILVESTRO

Apenaŭ.

MARIANETO (eligante la kapon tra la supra pordo)

Patrino, mi ne trovas la bandaĝojn, pri kiuj vi parolis.

MARIANO

Mi diris al vi, ke ili estas en la plej malsupra tirkesto de la ŝranko. Traserĉu bone, kaj vi ilin trovos.

MARIANETO (forirante)

Oni devas ofte ŝanĝi al li la tukojn.

SILVESTRO

Sed lasu ! Oni povus kredi, ke oni faris al mi grandan malbonon.

MARIANO

Jes, jes, oni devas ofte ŝanĝi ilin. Venu, mi malligos tiujn ĉi.
(Ŝi eksidas apud lin por fari, kion ŝi diris.)

SILVESTRO (malbonhumore)

Nu ! Jen denove !

SEGISMUNDO (alproksimiĝante)

Lasu, ke mi tion vidu ; mi estas iom sanigisto. (Kiam Mariano malligis, li diras, zorge rigardiate :) Nu, nu ! Dio helpu, mia kara.

SILVESTRO (kun vengemeco)

Lasu ; ĉio resaniĝos.

MARIANO

Silvestro !

SEGISMUNDO

Ĉu vi scias, kio bone laŭgos por tio ?

MARIANO

Kio ?

SEGISMUNDO

Ŝmiraĵo, kiun mi havas hejme, kaj kiun mi preparis antaŭ multe da tempo. Ĝi cikatrigas la vundojn kvazaŭ mirakle.

MARIANO

Ĉu vere ?

SEGISMUNDO

Vere.

MARIANO

Do, se ni ĝin provus ?...

SILVESTRO

Al la diablo !

SEGISMUNDO

Oni malgajnos nenion.

MARIANO

Jes, jes. Ĉu vi iras ĉe vin nun ?

SEGISMUNDO

Jes.

MARIANO

Do, mi iros kaj vi donos ĝin al mi, ĉu ne ?

SEGISMUNDO

Konsentite.

MARIANETO (enirante kun bandaĝoj en la mano)

Patrino, mi jam retrovis ilin. Bonan tagon, Segismundo.

SEGISMUNDO

Bonan tagon, karulino.

MARIANO

Jes, reŝanĝu al li tiun ĉi. Ke la aero lin ne tuŝu. Mi tuj revenos; mi iras ĉe Segismundon, kiu donos al mi tre bonan ŝmirajon, kiun li havas. Aranĝu lin, kaj zorge faru, ĉu ne ?

MARIANETO

Kompreneble mi zorge faros.

MARIANO (al Segismundo)

Ĉu ni iru ?

SEGISMUNDO

Pasu. (Ili ekiras.)

MARIANO (reveninte apud Silvestron)

Tio doloras vin multe, ĉu ne ?

SILVESTRO

Ne, diablo, ne!

MARIANO

Nu, Dio ! (Al Segismundo.) Ni iru, ni iru !

SEGISMUNDO

Adiaŭ, do.

SILVESTRO

Bonfarton.

MARIANETO

Adiaŭ.

MARIANO

Mi tuj revenos. (Al Segismundo :) Pasu, pasu ! (Paŭzo. — Ili foriras. Ŝi fermas zorge la pordon de la muro.)

(Marianeto sidiĝas apud Silvestron kaj sin pretigas involvi lian manon per la nova bandaĝo. Li etendas al ŝi la manon, ne rigardinte ŝin. Ŝi flegas tre zorge, rigardante lin de tempo al tempo, kaj dume ŝi diras :)

MARIANETO

Jen ... tiel ... nun, alia volvo. (Paŭzo. Tre tendre :) Ĉu mi doloras vin ? (Paŭzo.)

SILVESTRO

Ne ; daŭru, ankoraŭ. (Silvestro ankaŭ rigardas ŝin, kaj ambaŭ subite kaj reciproke rifuzas al si la rigardadon.)

MARIANETO

Alia volvo ankoraŭ... kaj restas ĝuste por la knoto. (Paŭzo.)

SILVESTRO

Ĉu vi ne finas?

MARIANETO

Tuj. (Kunligante.) Ĉu mi tro premas?

SILVESTRO

Ne. (Paŭzo.)

MARIANETO

Kiu flegas vin pli bone: ĉu mia patrino? ĉu mi? (Ŝi restas rigardante lin kun preskaŭa rideto. Li ankaŭ rigardas ŝin tre fikse, sed kun dolora esprimo. Post momento, tiamaniere pasigita, li, kun impulsa trunkvileco, prenas ŝian kapon per sia maldekstra mano, altiras ĝin al la sia, kaj li donas al ŝi fortan kison sur la buŝon. Unuamomente ŝi restas kvazaŭ terurita, ŝi faras timan movon, ŝi rigardas lin senmove..., sed subite ŝi ellasas sin, ĉirkaŭprenante lin kaj elprofunde plorante.)

SILVESTRO (milde apartigante ŝin, ne volante ŝin rigardi)

Lasu min, Marianeto, lasu min.

MARIANETO

Estas same: nun mi jam ĉion scias.

SILVESTRO

Ne, vi nenion scias; foriru. Kaŝu, kion mi faris; ne pensu pri tio; tio estis... mi ne scias, kio ĝi estis.

MARIANETO (montrante la lipojn)

Estis kiso... Silvestro... tie ĉi... vi vidas? Rigardu!

SILVESTRO (volante stariĝi)

Lasu min; kredu.

MARIANETO (haltigante kaj residigante lin)

Ne foriru. (Ŝi ĉirkaŭprenas lin kaj ploras.)

SILVESTRO

Kion vi faras ?

MARIANETO

Mi ploras, ĉu vi ne vidas ?

SILVESTRO

Sed kial ?

MARIANETO

Mi ne volas ĝin scii.

SILVESTRO

Ho, Marianeto, lasu min..., ne estas bone, ne povas esti....

MARIANETO (rigardante lin)

Tion saman mi povus esti dirinta al vi, kaj mi ne diris.

SILVESTRO

Kial do vi faris al mi tian demandon ?

MARIANETO

Kial do ordonis mia patrino, ke mi ŝanĝu la bandaĝojn !

SILVESTRO

Kial ni troviĝis unu kontraŭ la alia !

MARIANETO

Ĉu vi bedaŭras ?

SILVESTRO

Iru.

MARIANETO

Mi ne.

SILVESTRO

Mi iros do.

MARIANETO

Tion mi ne volas ; antaŭe vi devas diri, kial vi kisis min.

SILVESTRO

Mi ne scias.

MARIANETO

Mi scias, kial mi ne rifuzis.

SILVESTRO

Vi scias pli, ol mi.

MARIANETO

Tiun ĉi fojon, de vi al mi venas la scieco.... Ĝi estas, ke vi amas min. Diru ĝin al mi.

SILVESTRO (pripensinte kaj plorante siavice)

Eble jes.

MARIANETO

Ne ploru ; mi nenion pli volas scii.

SILVESTRO

Do, jen ; kvazaŭ nenio estus okazinta. Volu pensi, ke ĉio ĉi estis nur sonĝo. Eĉ parolu al mi neniam plu pri tio ; nek mi parolos al vi. Pensu ion ajn por malproksimigi vin aŭ malproksimigi min... jen, ni finu, ni finu ; edziniĝu !

MARIANETO

Ho ! kiajn konsilojn vi donas al mi ! Aliflanke, mi komprenas, ke vi estas prava, jes ; tio ĉi ne povas esti, ĝi estas peko, merta peko... kaj ankoraŭ pli bone estus, se mi ne amus vin, Silvestron ; sed mi amas vin, mi amas vin multe ! (Ŝi ploras kaj denove ĉirkaŭprenas lin.)

SILVESTRO

Ĉu vere?

MARIANETO

Multe... multe....

SILVESTRO

Sinjoro, mia Dio...! Vi sufokas min! Forkuru!

MARIANETO

Ne, mi ne sufokas vin. Vi ja sentas vin bone apud mi; mi ja suspektas, ke apud mi vi sentas vin bone.

SILVESTRO

Kompatu min, Marianeto!

MARIANETO

Ne mankas al mi kompato por ni ambaŭ; sed, kion vi volas, ke mi faru, se mi amas vin tiel multe? Ĉu ne, tio ne estas nova por vi? Diru ĝin al mi! Ĉu vi ne tion jam divenis, kvankam mi nenion diris? Mi sciis, ke mia devo estas ĉiam silenti, konsumiĝi pro ĉagreno, nenion dirante; kaj al tio mi estis decidita. Mi jam resignaciis, kaj eĉ mi estis kontenta, ĉar mi tion rigardis, kiel oferon al la amo, kiun mi havas por vi.

SILVESTRO

Sed kial vi ne silentis? Tio estus pli bona.

MARIANETO

Ĉu vi scias, kial ne? Ĉu vi scias, kio malriglis mian buŝon? La sango de tiu ĉi vundo, kiu, mi ĝin divenis, elversigis pro mi. Diru al mi nur, ke estas vero, kion mi diras, kaj mi faros ĉion, kion mi povos por reveni al silento. (Paŭzo.)

SILVESTRO

Estas vero, Marianeto.

MARIANETO

Vere?

SILVESTRO

Vere. (Montrante la kapon.) Mi havis ĉi tie tiun viron. Ŝajnis al mi, ke iun tagon, li forportos vin, kaj mi havis por li la tutan koleron, kiun oni povas havi por alia. Se vi sciis, kun kia ĝojo mi interbatalis kun li hodiaŭ, kaj kun kia plezuro mi estus elfininta lin, se oni ne estus veninta nin disigi. Kaj ĉio por vi, ĉio.

MARIANETO

Vi, do amas min multe?

SILVESTRO

Multe.

MARIANETO

De antaŭ ne longe?

SILVESTRO

Mi vidas, ke de antaŭ longe.

MARIANETO

De antaŭ ol vi fariĝis mia duonpatro?

SILVESTRO

Mi kredas, jes.

MARIANETO

Kial vi ĝin ne diris al mi?

SILVESTRO

Mi ne estus povinta.

MARIANETO

Do, vidu: mi, de antaŭ ne tiom da tempo. Mi povas diri, ke mi amas vin, de kiam mi vidis vin hejme.

SILVESTRO

Ĉu vi amis filon Labast?

MARIANETO

Mi kredis, ke mi amas lin.

SILVESTRO

Jes, jes, vi amis lin; ne tion neu.

MARIANETO

Kredu min, ne.

SILVESTRO

Ne? Mi antaŭ tion rimarkis, kion rimarkis via patrino. De unu vidpunkto, mi juĝis la aferon natura, de alia, mi ne sciis, kio okazis en mi. Ĉe la komenco, mi mem estis kontraŭ mi kolera. « Kial vi devas atenti tion ĉi? » mi diradis al mi. « Fraŭlinoj devas edziniĝi. » Nu. Tiel mi suferadis kaj silentadis, kiel vi silentadis dum tiu tempo, kaj plaĉus al mi, scii tute certe, ke neniam vi edziniĝos. Ĉu vi kredas, ke mi ne rememoras la tagon de la balo ĉe la kampa festo? De antaŭ ne longe mi fariĝis fianĉo de via patrino. Ŝi kaj mi estis en grupo kun la aliaj, dum vi kaj Labast turniĝadis sur la draŝejo de la « Espigolers », kaj ŝajnas al mi, ke tiam la malbonaj spiritoj ekkaptis min. Vi estis ruĝa, gaja; vi moviĝadis kiel kapridineto; vi en-sorĉita rigardadis filon Labast; vi ridadis kaj de tempo al tempo vi ektuŝetadis la sovaĝajn papavojn per viaj lipoj, kvazaŭ dankante lin, dum li apudiĝadis al vi, parolante mallaŭte kaj mangante vin per la rigardo. Se mi estus kuraĝa, mi estus dirinta al via patrino: « Mariano, nenio, kion ni decidis, valoras. Vi estus plaĉinta pli multe al mi, kiam vi estis juna. » Mi bone komprenis, ke vi estas la virino, kiu al mi mankis.

MARIANETO

Kial vi ne estis kuraĝa?

SILVESTRO

Mi ne scias. Via patrino akaparadis min. Estas ŝi, kiu edziniĝis kun mi. Ŝi havis tiajn parolojn, tiom da fajro en la animo!... Mi troviĝis en la reto tute senrimarke... kaj ĉiel, ĉio proksimiĝadis vin al mi... Tiam, vi ne atentadis min, ĉu ne?

MARIANETO

Ne tiel, kiel kiam vi restis kun ni.

SILVESTRO

Mi sufiĉe tion rimarkis.

MARIANETO

Poste, jes; tuj filo Labast foriĝis el mia kapo kvazaŭ mirakle, kredu min. Kiam mi vidadis vin apud la manĝotablo, mi faradis ĉiun eblon por rigardi vin, kiel duan patron, sed neniam mi prosperis. Kiam vespere, ĉe la fajro, vi fumadis la lastan cigaron apud patrino, dum vi ridadis al ŝiaj karesoj, mi komencis kredante, ke ne estas deca tion rigardi, kaj mi finis, sentante strangan jaluzecon kaj koleron, ankaŭ multe da kolero. Poste mi iradis kuŝiĝi... kaj mi ploradis kontraŭvole, kaj pensadis pri vi, kaj ju malpli mi voladis, des pli mi pensadis kaj ploradis, plie, plie ankoraŭ! Plaĉus al mi koni aliajn preĝojn, ol tiujn, kiujn oni al mi lernigis: ĉiuj estis malfortaj. Mi preĝadis ilin por apartiĝi de la danĝero, kaj por nenio ili taŭgis. Dum longa tempo mi apenaŭ dormadis; poste mi kutimiĝis al tiaj suferoj, kaj mi dormis, sed tiam la sonĝoj venis al mi..., kaj tio estis pli malbona!

SILVESTRO

Ni do suferis samtempe, kredu min.

MARIANETO

Kion vi volas diri?

SILVESTRO

Jes, sed mi suferadis pli, ol vi. Vi almenaŭ restadis sola, mi ne !

MARIANETO

Silvestro !

SILVESTRO

Kaj ofte, pense, mi havis vin en miaj brakoj, kaj estis ofte feliĉo, ke via patrino kaj vi havas la saman nomon.

MARIANETO

Kial, kial vi ne estis kuraĝa !

SILVESTRO

Ni ne parolu pri tio ; ni ne parolu ! Tion ni lasu, kaj ni faru ĉiun eblon, por ne plu pensi pri tio.

MARIANETO

Ĉu vi kredas, ke ni povos ?

SILVESTRO

Mi ne scias ; ni devas klopodi ! (Stariĝante) Promesu al mi, ke vi klopodos de via flanko.

MARIANETO (retenante lin)

Mi preĝos al Dio por tion atingi.

SILVESTRO (denove sidigante kaj kun multe da fajro)

Jes, jes ; preĝu Lin, preĝu Lin ! Li certe aŭskultos pli vin, ol min ! Diru al Li, kiel ni estas malfeliĉaj, kaj ke, se Li ne povas alporti al ni la bezonatan rimedon, Li forportu nin el la mondo !

(Mariano venas tra la pordo de la ĉirkaŭmuro ; ŝi tenas per la mano botelon kaj falditan paperon. Kiam ŝi malfermas kaj, ne rimarkita de ili, ŝi ekvidas ilin tiel kunligitajn en amo, ŝi restas surprizita, kaj subite ŝi komprenas la fatalon, kiu

ĉirkaŭas ŝin. Ŝi dubas pri tio, kion ŝi devas fari. La bato estas forta ; la amo, kiu sufokas ŝin, pli forta ankoraŭ. Ŝajnas, ke ŝi volas iri bati ilin ; ŝi haltas, dubas, ŝia koro dispeciĝas. Ŝi malantaŭeniras malgraŭ si mem..., ploras, vidas la morton proksima.... Penso de granda amantino lumigas al ŝi.... Ŝi malaperas.)

(Dum tiu ĉi muta ludo de Mariano, la dialogo daŭras sen interrompo.)

MARIANETO

Ho, ne, Silvestro ; min, se estas necese ! Vin, ne ; vi devas vivi.

SILVESTRO

Pli bone estas, ke vi vivu. Kion mi faras en tiu ĉi mondo ? !

MARIANETO (ĉirkaŭprenante lin forte)

Kial vi ne estis kuraĝa ? Diru, diru al mi.

SILVESTRO

Mi ne scias, mi ne volas tion scii. (Kisante ŝin) Vi vidas ? Ne, ne estas eble ! Mi deziras esti doninta al vi nenian kison ! Nun mi konas la guston, nun mi ne povas vivi sen ili.

MARIANETO

Ĉu la miaj plaĉas al vi ?

SILVESTRO (stariĝinte)

Iru, iru for !... via patrino povas alveni.

MARIANETO

Sed mi ne scias, kio okazas al mi.

SILVESTRO

Estas necese, ke vi sciu... ; lasu la hejmon, edziniĝu !

MARIANETO

Mi ne povas, Silvestro, mi ne povas !

SILVESTRO

Malamu min do !

MARIANETO

Ankaŭ mi ne povus ! (Ŝi ploras.)

SILVESTRO

Fatalo, fatalo !

(Oni aŭdas la kanzonon « Marianeto »-n, kantatan de Mariano, kiu alproksimiĝas. Oni komprenas en la voĉo suferon, kiun oni celas kaŝi. Tiel ŝi avertas ilin. Tuj kiam ili ambaŭ aŭdas ĝin, ili sin rigardas reciproke kaj, rapide, Marianeto stariĝas.)

SILVESTRO

Ĉu vi aŭdas ?

MARIANETO

Estas ŝi ?

(Komenciĝas la mallumigo.)

SILVESTRO

Jes, iru, sekigu viajn okulojn.

MARIANETO

Vi ankaŭ, rapidu ; oni vidas, ke vi ploris.

SILVESTRO

Ne havu timon, ne ; ŝi ne rimarkos tion ĉe mi. Iru vi.

(Mariano eniras kvazaŭ feliĉa, triumfanta. Ĉio, kion ŝi diros, estos dirita kun granda kaj profunda trankvileco ; trankvileco embarasa por tiuj, kiuj aŭskultas ŝin ; trankvileco pleneĝa de mistero.)

MARIANO (duone ridante)

Mi jam estas ĉi tie.

SILVESTRO

Kio do ?

MARIANETO

Ĉu vi alportas la ŝmiraĵon ?

MARIANO

Jes, mi alportas ĝin, kaj mi volas al vi ĝin meti tuj. Venu !

SILVESTRO

Tiel rapide ?

MARIANO

Jes, jes ; ni ne perdu tempon. Poto estas necesa ; jen, tie estas unu.

MARIANETO

Ĉu vi volas, ke mi iru ?

MARIANO

Ne, ne ; mi mem iras, mi mem iras. (Ŝi eniras en la domon.)

(Marianeto kaj Silvestro restas surprizitaj, kvazaŭ ne komprenante la agmanieron de Mariano. Ambaŭ ŝajnas demandi sin reciproke per la rigardo. Fine ŝi alproksimiĝas al li kaj diras per mallaŭta voĉo :)

MARIANETO

Ĉu ŝi aŭdis nin ?

SILVESTRO

Ne.

MARIANETO

Mi diras, ke jes !

SILVESTRO

Ne, mia kara, ne ; si tute ne aŭdis nin.

MARIANETO

Jes, jes.

SILVESTRO

Silentu, silentu !

(Marianeto rapidas iri renkonten al sia patrino, kiu venas kun la poto en la mano.)

MARIANETO

Donu !

MARIANO

Venu ; ni enverŝu iom en la poton, kaj ĉi tie mem ni povos lin ŝmiri. (Ŝi oksidas lacega sur la ŝtonbenkon.)

MARIANETO

Ĉu vi estas laca ?

MARIANO

Ne, ne ; mi ne estas laca.

MARIANETO

Mi mecu ja faros, donu !

MARIANO

Jen, rapidu. (Ŝi restariĝas kaj iras apud Silvestron.) Ĉu ĝi doloras vin ankoraŭ ?

SILVESTRO

Tute ne ! Pli bone estus, se vi farus al mi nenion, kedu min. (Paŭzo. — Ŝi rigardas lin fikse ; ŝi observas lin malgraŭ si mem.) Kion vi havas ?

MARIANO

Suferon por vi !

SILVESTRO

Kion, nu !

(Marianeto kaŝe atentis ilian dialogon.)

MARIANETO (irante al ili)

Ĉu tiel sufiĉos ?

MARIANO

Jes ; venu, venu.

(Ĉiuj iras apud la benkon. Silvestro sidiĝas. Mariano genufleksas kontraŭ li. Marianeto staras apud li kun la pota en la mano.)

(La mallumiĝo fariĝas pli intensa.)

MARIANO (al Silvestro, malvolvante lian manon)

Nun mi ŝmiras vin per tio ; sed post tri horoj mi banos vian manon per tiu akvo, kiun Segismundo notis ĉi tie (por la papero) Li certigas, ke tio estas kvazaŭ aldoni oleon al olelumilo.

SILVESTRO

Ankoraŭ malspritaĵojn ?

MARIANO

Kaj mi volas nepre fari, kiel li diris.

MARIANETO

Sed, kie vi ĉerpos tiun akvon ?

MARIANO

En « Les Planes » (1), ĉe la apotekisto.

SILVESTRO

Sed ĉu nun vi intencas iri al « Les Planes » ?

MARIANO

Kompreneble, jes.

SILVESTRO

Nu ! Mi jam diris al vi, ke mi ne plu volas medikamentojn. Se filo Labast tiun sciis, li ne malmulte ridus.

(1) Legu : *Las Planas*.

MARIANO

Kaj kion povus fari al mi lia rido ? Mi iros al « Les Planes ».

MARIANETO

Patrino, la nokto estas super ni.

MARIANO

Mi konas bone la vojon ; nenio malhelpas.

MARIANETO

Atendu ĝis morgaŭ.

MARIANO

Estas necese nun ; li tion diris.

SILVESTRO

Jen kun kio li nun venis.

MARIANETO

Ĉu vi volas, ke mi iru ?

SILVESTRO

Nek vi, nek ŝi.

MARIANO

Vi tute ne malhelpos min.

SILVESTRO

Sed, ĉu por nenio taŭgas, kion mi diras ?

MARIANO

Estas por via bono, ke tiun ĉi fojon mi malobeas vin. Estas mi, kiu devas tien iri ; mi, ĉar mi volas, ke via malbono ne pli-grandigu ; ĉu vi aŭdas ? (Ĉirkaŭprenante lin) Mi ne volas, mi ne volas, ke vi suferu ! (Al sia filino) Vi restu kaj flegu lin, Marianeto. (Ĉirkaŭprenante ŝin ankaŭ) Mi tuj revenos, mi bone konas la vojon ; kial vi havas timon ?

SILVESTRO

Ne moviĝu, Mariano, mi petegas.

MARIANO

Estas senutile, Silvestro ; mi decidis ; vi suferas, kaj tion vi ne volas al mi diri. Mi volas doni al vi la resanigilon ; nur mi, povas ĝin doni al vi. Adiaŭ. (Kun rigardado profunda, dolore malavara, kaj kun bela malĝojeco, ŝi adiaŭas siajn amojn, dirante :) Sed « Les Planes » estas nur je du paŝoj de ĉi tie ! (Ridante) Ĝis revido ! (Ŝi foriras ridante, rapida) Ĝis revido ; ĝis revido ! Ankoraŭ restos al mi multe da lumo.

SILVESTRO (insiste)

Mariano, restu !

(Marianeto silentas.)

MARIANO (malaperante)

Ĝis revido !

(Silvestro kaj Marianeto restas, kvazaŭ ne sciante, kio okazas al ili. Ili rigardas sin reciproke, ne kuraĝante diri unu vorton.)

SILVESTRO (irante al la pordo kaj kriante)

Mariano !

(Paŭzo.)

MARIANETO

Lasu ŝin... estas senutile.

MARIANO (malaperinte, de tre malproksime)

Ĝis revido !

(Paŭzo.)

SILVESTRO (restas apud la pordo, kaj post momento)

Ne..., ŝi vidis nin.

MARIANETO

Ŝi estus ion dirinta. (Paŭzo.) Ŝi ne lasus nin solaj, ne.

(Ambaŭ rigardas sin reciproke kaj demande.)

SILVESTRO (kvazaŭ al si mem)

Do ?

MARIANETO (ne povante kompreni)

...Mi ne scias...

(Ambaŭ restas rigardante sin de malproksime, kaj malstreĉas la sultrojn kun embarasa rezignacio.)

(La mallumiĝo estas tre intensa.)

(Kurteno.)

AKTO TRIA

Sama scenejo.

Nokto. Sonoris la tria horo. Neniu estas en la korto, kaj oni ekvidas lumon tra la supra fenestro. Post momento, Silvestro malsupreniras la ŝtuparon kaj malrapide iras al la pordo de la ĉirkaŭmuro. Li malfermas ĝin kaj rigardas eksteren.

SILVESTRO

Neniu! (Li restas apogita al la pordo kaj metas sian kapon inter siajn manojn). Neniu!

MARIANETO (negliĝe, malkombita aperinte ĉe la sama loko)

Ĉu oni nenion aŭdas?

SILVESTRO

Nenion! Sed kial vi malsupreniras? Ĉu mi ne diris al vi, ke vi restu supre? Lasu min sola..., iru!

MARIANETO

Mi ne povas obei vin.

SILVESTRO

Foriru, Marianeto.

MARIANETO

Estas senutile!

SILVESTRO

Ĉu vi povas ankoraŭ tiel paroli?!

MARIANETO

Kiel vi volas do, ke mi parolu ?

SILVESTRO

Mi ne scias. Tio, kion mi volas ; tio, kio estas necesa, estas, ke vi ne alproksimiĝu al mi, kaj vi ne faras ion ajn por prosperi en tio ; mi faros mem, mi juras !

MARIANETO

Sed kion vi faros ?

SILVESTRO

Ankaŭ mi ne estas certa pri tio ; mi forkuros malproksimen, tre malproksimen ; mi ne revenos plu ; mi foriros, profitante la unuan okazon, kaj poste mi zorgos, ke neniam plu vi sciu pri mi.

MARIANETO

Vi ne faros tion, Silvestro !

SILVESTRO

Kiu povas malhelpi min ? Diru !

MARIANETO

Mi.

SILVESTRO

Vi ?

MARIANETO

Jes.

SILVESTRO

Kiel ?

MARIANETO

Kurante tien, kien vi iros ; sekvante vin ĉiam, ĉiam !

SILVESTRO

Vi nur babilas; vi ne atentas, kion vi diras; vi ne volas memori, kie ni estas, nek kio ĉirkaŭas nin.

MARIANETO

Sed, kion ni povas fari, ni? Diru!

SILVESTRO

Demandu min pri nenio; lasu min!

MARIANETO

Ja mi bezonas demandi pri tio, pri kio mi ne scias respondi.

SILVESTRO

Mi nur povas respondi laŭ unu maniero.

MARIANETO

Kiel? Ni vidu!

SILVESTRO

Petegante vin por tio, kio estas plej sankta, ke vi volu min kompati, ke vi sekvu miajn konsilojn, ke vi iru al vilaĝo kiel servistino, ke vi restu longatempe, ne vidante min. Ni ambaŭ tion bezonas, kedu min! Eble, ĉio ĉi nur estas momenta ekbrulo; eble ni ankoraŭ povas retrovi rektiĝon. Foriru!

MARIANETO

Kaj kiam mi estos en la vilaĝo, kion?

SILVESTRO

Mi ne scias: mi ne vidos vin, vi ne vidos min.

MARIANETO

Kaj ĉu tiel ĉiu malsano malaperas?

SILVESTRO

Ni provu almenaŭ!

MARIANETO

Neniĉ ti helpos nin !

SILVESTRO

Ĉu vi kredas ?

MARIANETO

Mi estas certa, pli ol certa !

SILVESTRO

Kio do, restas al ni por fari ! ?

MARIANETO

Daŭri sur nia vojo.

SILVESTRO

Neeble, ne estas eble ; vi ne pensas pri via patrino ; tio ĉi estas kondamni nin.

MARIANETO

Ho, patrino !...

SILVESTRO

Jes, patrino, ŝi mem !

MARIANETO

Ŝi kondukis vin al mi.

SILVESTRO

Ĉu vi akuzas ŝin ?

MARIANETO

Kiu diras tion ?

SILVESTRO

Ĉu vi bedaŭras ?

MARIANETO

Ne.

SILVESTRO

Do ?

MARIANETO

Do !... Nu, ne volu ankaŭ, ke mi respondu al vi kelkajn demandojn. Ne volu pensigi min pri hieraŭ nek pri morgaŭ ; ni lasu ĉiun pasintajon kaj ĉiun alvenontajon... ; mi nur povas pensi pri nun, jes, nur pri nun. (Ŝi intencas ĉirkaŭpreni lin.)

SILVESTRO (rifuzante ŝin)

Malproksimiĝu !

MARIANETO

Mi volas pensi nur pri nun, Silvestro, kaj vi ankaŭ tiel pensas, sed vi estas pli malkuraĝa, ol mi, kaj vi mem timigas vin. Al mi ĉio estas jam egala. Se oni montrus al mi la morton je du paŝoj, kaj oni dirus al mi, ke, nur ne pensante pri nun, ĝi foriros malproksimen... mi lasus ĝin antaŭeniri ĉiam, por ne forlasi la penson.

SILVESTRO

Vi deliras, kreu min.

MARIANETO

Kaj mi estas ĝoja pro tio. Vi multe suferas, ĉar vi estas trankvila.

SILVESTRO

Estu trankvila ankaŭ ; necese estas al ni.

MARIANETO

Se mi estus trankvila, mi ne amus vin.

SILVESTRO

Sed, vi ne povas ami min !

MARIANETO

Neniu povas malpermesi tion.

SILVESTRO

Via patrino.

MARIANETO

Ĉiam patrino ! Jam, en mia frenezo, mi ne povas rigardi tiel, Se la patrino estas freneza, ankaŭ tia estas la lilino, kaj pli multe pli, ol ŝi.

SILVESTRO

Silentu, pro Dio, Marianeto !

MARIANETO

Malkuraĝulo !

SILVESTRO

Kiel ?

MARIANETO

Jes, malkuraĝulo ! Vi ne amas min, kiel mi vin ! Vi jam kutimiĝis vivadi dorlotita, kaj vi estas mallaborema por pensi pli malproksimen.

SILVESTRO

Ĉu, ke mi ne amas vin, vi diris ?

MARIANETO

Estas egale. Mi, jes, mi amas vin multe, multe ! Kaj mi ne volas lasi vin, ne ; ne atendu tion de mi.

SILVESTRO

Sed kio fariĝos nia vivo !

MARIANETO

Valo de larmoj.

SILVESTRO

Estos terure !

MARIANETO

Ĉio estas hela kun la amo.

SILVESTRO

Ho, la amo! La amo! (Paŭzo. — Li iras rapide al la pordo.)

MARIANETO

Kion vi aŭdas?!

SILVESTRO (aŭskultinte)

Nenion; mi kredis!... Neniu venas. (Paŭzo.)

MARIANETO

Ŝi venos dum la ektagiĝo; ne timu.

SILVESTRO

Io povas esti okazinta al ŝi; ŝi intencis reveni post du horoj.

MARIANETO

Mi ne volas imagi, ke io estas okazinta al ŝi.

SILVESTRO

Ŝi diris, ke ŝi revenos tuj.

MARIANETO

Mi jam pensis, ke ŝi eraras. « Les Planes » estas pli malproksime, ol ŝi kredis.

SILVESTRO

Sed...

MARIANETO

Eble ŝi restis tranokti ĉe onklino Rozo, kiu certe ne lasis ŝin reveni en tiaj horoj.

SILVESTRO

Ĉu vi kredas?

MARIANETO

Mi estas certa.

SILVESTRO

Ĉio ĉi estas al mi stranga.

MARIANETO

Ne priokupiĝu ; okazis kiel mi diras... (Paŭzo.)

SILVESTRO (irante denove al la ekstera pordo)

Valo de larmoj ! (Paŭzo.)

MARIANETO

Kion vi diras ?

SILVESTRO

Valo de larmoj!... jes... jen nia vivo.

MARIANETO (sidigante apud lin)

Oni vidas, ke vi ne kutimiĝis al la ploro ; tiel vi estas timema ! Mi tiel ploris dum tiu lasta tempo, ke plori jam ne ŝajnas al mi puno, kaj mi estus surprizita, se jam por mi estus fermita la fonto de la larmoj. Vi al kutimiĝos, Silvestro. Ni al kutimiĝas al ĉio en la vivo !

SILVESTRO

Sed mi nenion povas kompreni el tio, kio al mi okazas. Mi eĉ pensas, ke hodiaŭ mi aperigas por la unua fojo la kapon en la mondon tial, ke mi vidas kaj aŭdas aferojn, pri kiuj neniam mi estus pensinta. Mi ja bone kaj tre bone sciis, ke mi amis vin, jes, mi estis certa pri tio ; sed eĉ per minaco de morto oni ne estus povinta kredi min pri ĉio, kio okazas al mi... kio okazas al ni. Mi preferus, ke al tiu kiso, kiu elfalis el miaj lipoj, vi estus respondinta per vangfrapo, forkurinte, lasante min sola. Nun mi ne scias, kie mi estas, nek kien mi iras, kaj ĉia feliĉo montriĝas al mi, kiel kalvario.

MARIANETO

Vi kredas do, ke mi estas nenio apud vi! Ni ambaŭ estas kompatindaj, Silvestro, kaj unu devas subteni la alian.

SILVESTRO

Ni ne povas subteni nin reciproke; nia proksimeco nur ruinigos nin.

MARIANETO

Sed, kio pli bona, ol tio ĉi, se alimaniere ni, ne povas vivi?

SILVESTRO

Ĉion vi vidas facila!

MARIANETO

Mi amas vin! Ĝi estas la sola afero, kiun mi scias, kaj mi volas, volas, ke vi amu min, kiel mi vin.

SILVESTRO

Se tiel vi amas min, kredu: preferinde estas, ke vi foriru. Pensu, kiel vi suferos, kiam vi vidos kaj aŭdos vian patrinnon apud mi.

MARIANETO

Ankaŭ al tio mi alkutimiĝos, se mi scias, ke neniu rabas vian penson al mi.

SILVESTRO

Ni troviĝos unu apud la alia eĉ ne vole; ĉie ni kredos, ke estas sufiĉe da ombro por ne esti vidataj. Ni estos malfeliĉaj.

MARIANETO

Ni ankaŭ estos tiaj, malproksime.

SILVESTRO (starigante)

Kaj kiam via patrino estos rimarkinta tion, tiam ĉio ja estos neebla, kaj nur Dio scias, kio okazos; ĉar ŝi rimarkos, ĉu vi aŭdas? Kaj kion ni faros tiam? Diru!

MARIANETO

Ĉu mi ne diris al vi : ne parolu al mi pri morgaŭ !

SILVESTRO

Necese estas paroli, eĉ malgraŭ ni mem... Ho ! se nur oni povus fari, kion oni deziras !

MARIANETO

Kion vi farus ?

SILVESTRO

Ĉu vi, demandas min pri tio ? Simile al tiu, kiu ĵetadas teron en kavajon, mi ĵetadus teron sur tutan pasintajon, ĝis kiam ne unu postsigno restus, kaj, sur tiu sama tero, mi ĉirkaŭprenus vin ravita kaj feliĉa en la ripozado post mia longa laboro. Poste mi alkondukus vin al la nesto, kaj solaj, tute solaj, tute solaj....

MARIANETO

Diru... diru !

SILVESTRO

Kial, kial vi volas, ke mi diru ?

MARIANETO

Solaj, tute solaj vi rigardadus min, dirante nenian vorton ; kaj ĉe ĉiu kiso mia, nova rideto glitus sur viaj lipoj, ĉu ne ?

SILVESTRO

Kaj mi sufokus vin per forta ĉirkaŭpreno !

MARIANETO

Kaj mi karesus viajn harojn, kiel ĵus mi faris, rigardante vin ĉiam, ĉiam.

SILVESTRO

Kaj ni falus teren, mangante nin per kisoj.

MARIANETO

Kaj mi vidus vin ofte, kiel mi ĵus vidis vin : kun la okuloj brilantaj, kaj ne pro larmoj ; kaj sentante vian bruston sango-batantan sur la mia, kvazaŭ oni min skurgus... (Ŝi ĉirkaŭprenas lin).

SILVESTRO

Foriru !

MARIANETO

Ne krii !

SILVESTRO

Ĉu vi aŭdas iun ?

MARIANETO

Eble. Hodiaŭ estas festo kaj frumatene pasas la karbofaristoj de « Sirals » (1).

SILVESTRO

Estas festo... Festo por la bonuloj.

MARIANETO

Ni ne estas malbonaj, ni.

SILVESTRO

Preferinde estus, se ni estus tiaj. (Paŭzo.) Kaj via patrino ne venas.

MARIANETO

Ne havu korprenon pro ŝi. Ŝi venos dum la ektagiĝo. Ĉu vi estas maltrankvila ?

SILVESTRO

Jes, mi dezirus havi ŝin ĉi tie... inter ni, tuj ; mi havas timon. La koro al mi diras, ke, kiam venos la tago kaj mi troviĝos antaŭ ŝi, mi sentos min, kiel tiu, kiu travivis malbonan songon, kaj mi retransviligiĝos iom post iom.

(1) Legu : *Sirals*'.

MARIANETO

Ĉu vi esperas, per ŝiaj kisoj forgesi la miajn ?

SILVESTRO

Ho, ne ! (Li ĉirkaŭprenas ŝin.) Ne ! (Paŭzo.)

MARIANETO

Kiel bone oni estas tiel ! Mi deziras, ke ĉiam estu nokto !

SILVESTRO

Mi ankaŭ ; mi amas vin multe. (Paŭzo. — Oni aŭdas kanton de koko) (Lasinte ŝin) Ĉu vi aŭdas ? (Paŭzeto.)

MARIANETO

Jam kantas la kokoj ?

(Alia koko respondas.)

SILVESTRO

Jam tie oni ekvidas la krepuskon.

MARIANETO

Tiel malfrue estas ? Kiom da fojoj mi vidis ĝin, de tiu fenestro, tute sola. Neniam mi rigardis ĝin tiel... neniam ! (Paŭzo. — Ŝi ĉirkaŭprenas lin denove.)

SILVESTRO

Iru supren. (Marianeto eksupreniras malrapide la ŝtuparon. — De la pordo.) Oni vidas neniun, neniun

MARIANETO (haltinte)

Ne timu... ŝi revenos. (Ŝi malaperas.)

(Silvestro restas sola ; lia vizaĝo montras lian staton de amo, bedaŭro, lukto, korpreniĝo. Li rigardas denove tra la pordo ; poste li rigardas la fenestron, kie estas lumo. Tiu ĉi estingiĝas. Tiam li, post momento de hezito, silente fermas la pordon kaj per ŝancelaj paŝoj eksupreniras la ŝtuparon. Kiam li ankoraŭ ne trairis la unuan duonan parton, oni aŭdas alfrapon al la ekstera pordo. Silvestro haltas momenton dubante, ĉu li aŭdis. Oni realfrapas. Tiam li rapide malsupreniras kaj tuj malfermas.)

SILVESTRO (per mallaŭta voĉo)

Ĉu vi, Mariano?

(Segismundo aperas mistere. Oni ekvidas ĉe la fundo kelkajn homojn, kiuj restas preter la pordo).

SEGISMUNDO (enirante malrapide kaj zorge; — ankaŭ per mallaŭta voĉo)

Ĝi estas mi, Silvestro.

(La tagiĝo fariĝas intensa iom post iom.)

SILVESTRO

Kiu vi estas?

SEGISMUNDO

Segismundo.

SILVESTRO

Vi?

SEGISMUNDO

Jes.

SILVESTRO

Nu! Kio okazas al vi? Kien vi iras tiel frumatene?

SEGISMUNDO

Parolu mallaŭte; parolu mallaŭte.

SILVESTRO

Kio okazas?

SEGISMUNDO

Mi deziris vidi vin.

SILVESTRO

Sed...

SEGISMUNDO

Kie estas Marianeto ?

SILVESTRO

Supre ; eble dormante. Mi ĵus malsupreniris rigardi, ĉu venas aŭ ne Mariano, kiu foriris al « Les Planes » serĉi tion, kion vi skribis al ŝi sur paperon.

SEGISMUNDO

Ĉu por tio ŝi eliris ? Nun mi komprenas.

SILVESTRO

Por tio. Ĉu vi vidis ŝin ?

SEGISMUNDO

Ne.

SILVESTRO

Do ?

SEGISMUNDO

Ŝi ne revenis, ĉu ne ?

SILVESTRO

Ne ; kiel vi scias tion ?

SEGISMUNDO

Mi scias....

SILVESTRO

Ĉu io okazis ? Diru.

SEGISMUNDO

Parolu mallaŭte, ke Marianeto ne aŭdu.

SILVESTRO

Sed, kio okazas ? Parolu.

MARIANETO (aŭdinte la interparoladon kaj aperinte ĉe la fenestro de sia ĉambro)

Silvestro, ĉu vi estas malsupre ? Kun kiu vi parolas ? Ĉu alvenis patrino ?

SEGISMUNDO

Silentu, silentu.

SILVESTRO

Jes, mi estas.

MARIANETO

Ĉu patrino estas ĉi tie ?

SEGISMUNDO

Ne, ne ankoraŭ.

MARIANETO

Sed kiu respondas al mi ? Ŝajnas la voĉo de Segismundo.

SILVESTRO

Li mem.

MARIANETO

Tiel frumatene ?

SEGISMUNDO

Okaze mi pasis, kaj...

MARIANETO

Kaj, se mi ne eraras, mi vidas homojn ekster la ĉirkaŭmuro. Kion vi deziras ? Kio okazas ?

SILVESTRO

Nenio ; rekuŝiĝu ; ne malsupreniru.

MARIANETO

Ĉu, ke mi ne malsupreniru, vi diras ?

(Ŝi malaperas kaj reaperas tuj sur la ŝtuparo.)

SEGISMUNDO

Ŝi malsuprenvenas.

SILVESTRO

Jes, parolu tuj.

SEGISMUNDO

Ni tro laŭte parolis.

SILVESTRO

Diru, diru ; ne plu lasu min en maltrankvileco. Kio okazas ?
Kio estas ĉio ĉi ?

SEGISMUNDO

Al la diablo, se mi scias kiel diri.

SILVESTRO

Rapidu, antaŭ ol ŝi estos ĉi tie. Estas pri Mariano, pri kiu vi
volas paroli al mi, ĉu ne ?

SEGISMUNDO

Jes.

SILVESTRO

Finu.

SEGISMUNDO

Nu ! Do

SILVESTRO

Kio ?

SEGISMUNDO

Ŝi estas mortinta.

SILVESTRO (per granda krio, ne atentinte, ke Marianeto malsupreniras)
Mortinta !

SEGISMUNDO

Silentu.

MARIANETO

Kion vi diris ? Kion vi diris ? Pri kiu vi parolis ?

SEGISMUNDO

Ŝi aŭdis nin.

SILVESTRO

Nenio... nenio... Segismundo... la... estas nenio, estas nenio.

SEGISMUNDO

Iru supren, Marianeto.

MARIANETO

Diru al mi tion, kion vi diris tuj. Nenion kaŝu al mi. Kion vi deziras, Segismundo ? Kion deziras tiuj, kiuj restas ekstere ? (Ŝi iras al la pordo kaj ŝi malfermas ĝin.) Kion vi faras ĉi tie ? Ho, ĉiuj, ĉiuj silentaj ! (Al Silvestro) Kaj vi, kion vi diras al mi ? Ĉu vi ploras ? (Diveninte) Patrino ! Patrino ! Jes, pri ŝi vi parolis ! (Silvestro sidigas sur la benkon de la fenestro kaj ĝeme ploras.) Kio okazis al mia patrino ? Diru al mi, kie ŝi estas ? Mi volas vidi ŝin ! Mi volas vidi ŝin ! (Ŝi freneze ekforiras.)

SEGISMUNDO

Marianeto !

FRAŬLINO

Kien vi iras ?

ALIA

Haltu !

UNU VIRO

Kion vi povas fari nun ?

ALIA

Nun, ĉio estis !

MARIANETO (reenirante)

Ho ! (irante al Silvestro) Ĉu mortinta ? (al Segismundo) Ĉu mortinta ?

SEGISMUNDO (mallevante la kapon)

Nur de Dio dependas nia vivo !

MARIANETO (intencante eliri denove)

Mi volas vidi ŝin ; mi volas vidi ŝin !

SILVESTRO (starigante)

Ŝin haltigu !

SEGISMUNDO

Marianeto !

(Tiuj el la grupo haltigas ŝin kaj la fraŭlinoj eniras kun ŝi ; ĉiuj parolas samtempe, kvazaŭ ili volus konvinki ŝin, ke ŝi restu.)

MARIANETO

Kie ŝi estas ? Mi volas scii ĉion, ĉion !

SEGISMUNDO

Ni mem ne scias. Petro Malest venis avizi min, por ne dirition rekte al vi mem.

SILVESTRO

Sed...

MARIANETO

Kion !... Kiel !

SEGISMUNDO

Veninte de « Sagrest »⁽¹⁾ kaj pasante tra la profundajo de « Comabella » oni renkontis ŝin enabismigitan.

(1) Legu : *Sagrest'*.

SILVESTRO (al si mem)

Enabismigitan !

MARIANETO (svenante)

Ho !! (Ŝi falas en la brakojn de la fraŭlinoj.)

UNU VIRO (preninte ŝin kaj enigante ŝin en la domon)

Estas nenio ; estas nenio.

(La fraŭlinoj interparoladas. Unu el ili iras plenigi poton el sitelo, kiu kuŝas apud la puto. — Movigado ĉe la fundo.)

SILVESTRO (ne rimarkinte la svenon de Marianeto, kaj al si mem)

Enabismigita ! (Forte plorante) Enabismigita !

PETRO MALEST (rapide enirante, kaj al viro, kiu venas el la domo kaj rapidas eliri)

Ĉu ili jam scias ĉion ?

LA VIRO

Jes. (Li foriras.)

SEGISMUNDO (vidinte la alveninton)

Jen ĉi tien Petro ; li rakontos al vi.

(De tempo al tempo, koko kantas, kaj alia respondas al ĝi de tre malproksime.)

SILVESTRO

Rakontu ! Rakontu !

PETRO MALEST

Malmulte mi povas rakonti, Silvestro. Mi venis de « Sirals », kiel ĉiun sabaton ni venas pasigi la feston hejme, kaj ni trovis ŝin, kiel eble oni jam diris al vi.

SILVESTRO

Jam mortintan ?

PETRO MALEST

Tute mortintan. Mi venis, kurante, diri tion al Segismundo ; mi lin vekis por rakonti al li la aferon. Nun, oni kunportas ŝin.

SEGISMUNDO

Mi restis surprizita, lin aŭdinte ; mi kredis, ke ŝi jam estis reveninta de « Les Planes ».

PETRO MALEST

De « Les Planes » ?

SEGISMUNDO

Jes, ŝi iris tien por medikamento. Nun mi ĉion komprenas : ŝi pasis tra la plej rekta vojo, la nokto kaptis ŝin....

PETRO MALEST

Kaj ŝi falis ?...

SEGISMUNDO

Kiel vi diras : ŝi falis ; ŝi marŝadis ne atentante....

(Ĉiama movigado ĉe la fundo.)

SILVESTRO (plorante)

Mia Dio ! Mia Dio !

PETRO MALEST

Kion oni povas fari al tio ?

SILVESTRO

Mortinta !

(Petro Malest parolas al li.)

SEGISMUNDO (al fraŭlino, kiu iras al puto ĉerpi akvon)

Kaj Marianeto ?

LA FRAŬLINO

Ŝi jam rekonsciigis. (Ŝi elĉerpas akvon kaj revenas en la domon.)

SILVESTRO (ploraute)

Mortinta !

SEGISMUNDO (al Petro Malest)

Ni iros kune ; ni vidos, kion ni devas fari.

PETRO MALEST

Kiel vi volos. (Li eniras en la domon.)

(Oni aŭdas internan paroladon. La tago pliheliĝas. Oni aŭdas de malproksime la unuan sonoradon de la matena meso. Unu el la fraŭlinoj malfermas la mal-supran fenestron. Interne vidiĝas nur siluetoj kaj la helo de olelumilo, kiu estas sur la tablo.)

SEGISMUNDO (al Silvestro)

Kaj vi, estu forta ! Nun, pli ol iam, vi devas esti forta ! Kion vi povas fari al tio ? Neniam ni scias, elirante el nia hejmo, kio okazos al ni, antaŭ ol reveni. Ŝi eliris por vi, por via bono, plena de zorgo kaj de amo. Mankis al ŝi en la mallumo la tero sub la piedo. Ŝia horo estis alveninta. Tio devis esti.

SILVESTRO

Jes, jes, vi estas prava... (Ploras denove.)

SEGISMUNDO

... Kaj ankaŭ nenion vi plibonigos plorante. (Oni aŭdas la mal-laŭtan ploron de Marianeto.) Lasu la ploron al ŝia flino, kaj estu sufiĉe forta por konsoli ŝin.

UNU FRAŬLINO (kiu estas ĉe la doma pordo kun alia fraŭlino)

Segismundo !

SEGISMUNDO

Kion vi volas ? (Iras al ili ; parolas kun ili.) Bone, bone, ne faru bruon ; estas bone, iru, iru. (Dum ili foriras.) Jes, jes, mi venos poste.

(Viro, kiu venas el la domo, parolas kun Segismundo ĉe la fundo. La viro foriras, kaj Segismundo eniras en la domon.)

SILVESTRO (ĉagrenpremita kaj ĉiam en la sama loko; intense emociita)

Mankis al ŝi en la mallumo la tero sub la piedo. (Paŭzo. Li restas absorbata.) Ne!... Ŝi vidis nin... (Li kaŝas la vizaĝon en la manojn kaj ploras kviete.)

(Interne de la domo, daŭras la konfuza parolado kaj la ploro de Marianeto.)

(Koko kantas; alia respondas.)

(La tago pliheliĝas malrapide.)

(Oni aŭdas sonori la meson de tre malproksime.)

(Du fraŭlinoj malaperas tra la fundo, parolante inter si.)

(En tiu momento, viro eniras kaj ŝajnas sciigi la fundan grupon, ke tiuj venas, kiuj kunportas la mortintinon. Ĉiu iras kun granda interesiĝo al la pordo kaj tie alveninte, ili malkovras siajn kapojn respektplene. — Tio ĉi laste dirita devas rapide okazi.)

(Kurleno.)


KANTO AL MARIANETO

Moderate.

A - di - aŭ Ma - ri - an - et - o De
mi - a so - pir' prin - cin; Se est - us vin ne kon -
- int.a, Ne mi, nun be - daŭ - us vin. Ho Ma - ri - a - net', a -
- di - aŭ! De mi - a so - pir' prin - cin!

Moderate.

La vi - a a - mant' ĉe l'por - do, A -
- tend - as nur "jes" de vi; La patr - on ne mal - ĝoj -
- ig - u Por ke ve - nu ĝoj' al mi. Mi far - iĝ - os ja mo -
- nah.o; Ne rest - os mi ti - e ĉi!



KOLEKTO DE " LA REVUO "

LITERATURA FAKO

- Angla lingvo sen profesoro**, unuakta komedio de TRISTAN BERNARD, tradukita de GASTON MOCH.
Unu volumo in-8, 44-paĝa Fr. 1 •
- Aspazio**, tragedio en kvin aktoj, de A. SVJENTOHOVSKI, trad. de D^o LEONO ZAMENHOF.
Unu volumo in-8, 154-paĝa 2 50
- Brazilio**, parolado de S^o EVERARDO BACKHEUSER.
Unu volumo in-8, 28-paĝa, kun ilustraĵoj ekstertekste 1 50
- Bukedo**, artikoloj pri literaturaj kaj beletristikaj demandoj, de CH. LAMBERT.
Unu volumo in-8, 159-paĝa 2 •
- Frenezo**, du unuaktaj drametoj, originale verkitaj de FR. PUJULA Y VALLES.
Unu volumo in-8, 40-paĝa 1 •
- Imenlago**, novelo de THEODOR STORM, trad. de ALFRED BADER.
Unu volumo in-8, 33-paĝa • 75
- La libro de P^o Humorajo**, originale verkita de PAUL DE LENGYEL.
Unu volumo in-8, 194-paĝa 2 50
- La Faraono**, romano de PRUS, tradukita el la pola lingvo de D^o BEIN.
Unua volumo in-8, 194-paĝa 2 •
Dua volumo in-8, 238-paĝa 2 •
Tria volumo in-8, 191-paĝa 2 •
- La Reĝo de la montoj**, de Ed. ABOUT, trad. de G. MOCH.
GUSTAVE DORÉ.
Unu volumo in-8, 245-paĝa 3 50
- La Rompantoj**, kvin monologoj originale verkitaj de FR. PUJULA-VALJÉS.
Unu volumo in-8, kun ilustraĵoj, 40-paĝa 1 •
- La Tria**, memorajoj pri la Tria Kongreso.
Unu volumo in-8, 46-paĝa, ilustraĵoj ekstertekste 1 50
- Laŭroj**, kolekto de premiitaj verkoj en la Unua literatura konkurso de "La Revuo".
Unu volumo in-8, 142-paĝa 2 •
- Makbeto**, kvinakta dramo de SHAKESPEARE, tradukita de D^o LAMBERT.
Unu volumo in-8, 125-paĝa 2 •
- Misteroj de Amo**, du unuaktaj dramoj, originale verkitaj de NADINA KOLOVRAT.
Unu volumo in-8, 48-paĝa • •
- Mistero de doloro**, dramo en tri aktoj de ADRIÀ GUAL, tradukita el kataluna lingvo de FR. PUJULA Y VALLES.
Unu volumo in-8, 96-paĝa 2 •

TEKNIKA KOLEKTO

Anatomia vortaro (en latina, franca, angla kaj esperanta lingvoj), verkita de la MEDICINA ESPERANTISTA GRUPO. Unu volumo in-8	Fr. 4 50
Komercaj leteroj en Esperanto, kun vortareto kvarlingva, de P. BERTHELOT kaj Ch. LAMBERT. Unu volumo in-16.	50
La komerca sekretario , de Ros. SUDRIA. Unu volumo in-16.	50
Matematika terminaro kaj krestomatio , de R. BRICARD. Unu volumo in-16.	75
Monadologio , de LEIBNIZ, tradukita de E. BOIRAC. Unu volumo in-16.	60
Muzika terminaro , de F. DE MÊNIL. Unu volumo in-8, 20-paĝa	60
Praktikaj komercaj leteroj (en esperanta kaj franca lingvoj), de J. C. O'CONNOR, Ph. Dr. M. A., kaj D. D. P. HUGON. Unu volumo in-16.	90
Provo de Marista Terminaro , verkita sub la direkto de M. ROLLET DE LISLE. Unu volumo in-8 (<i>bindita</i>).	1 50
Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie , avec modèles de lettres (en français et Esperanto), par R. LEMAIRE. Unu volumo in-8	40
Vocabulaire technique et technologique Français-Esperanto , par CHARLES VERAX. Unu volumo in-8 (<i>bindita</i>).	2 50

MUZIKO

Himno al Zamenhof , paroloj kaj muziko de R. DESHAYS	1
La Vojo (kanto kaj fortepiano), paroloj de D ^{no} ZAMENHOF, muziko de R. DESHAYS	35
Esperanto (valso por fortepiano), muziko de F. DE MÊNIL	50
La kanto de l' cigno (melodio), poemo de SVIRIDOV, muziko de F. DE MÊNIL	1
Mi aŭdas vin , poezio de LEONO ZAMENHOF, muziko de F. DE MÊNIL	1
Kuŝas somero , poezio de TH. KANALOSI-LEFFLER, muziko de F. DE MÊNIL	1

KOLEKTO ESPERANTO

Advokato Patelin , unuakta komedio de BRUEYS et PALAPRAT, tradukita de J. EVROT.	
Unu volumo in-16	Fr. = 75
Albumo de Konataj Esperantistoj , de FARRZ SCHUCK.	
Unu luksa volumo, 33-paĝa (ekzistas ankoraŭ nur kelkaj ekzempleroj).	3 =
Cikado ĉe Formikoj , et LABICHE et LEGOUVE, unuakta komedio.	
Unu volumo in-16	= 80
Ĉu ĉi? romano originale verkita de D ^o VALLIENNE.	
Unu volumo in-16	4 =
Diversaĵoj , rakontoj tradukitaj de S ^{mo} LALLEMANT kaj BEAU.	
Unu volumo in-16	1 25
Don Juan , kvinakta komedio de MOLIERE, tradukita de E. BOIRAC.	
Unu volumo in-16	1 50
Elektitaj Fabeloj de Fratoj GRIMM, tradukitaj de D ^o KABE.	
Unu volumo in-16	1 80
Elektitaj Fabeloj de LA FONTAINE, esperantigitaj de G. VAILLANT.	
Unu volumo in-16	= 75
Eneldo , de VIRGILIO, kantoj I-XII, tradukitaj de D ^o VALLIENNE.	
Unu volumo in-16	3 =
Esperantaj Prozaĵoj , de diversaj aŭtoroj.	
Unu volumo in-16	2 50
Inter blinduloj , de D ^o JAVAL, tradukis S ^{mo} JAVAL.	
Unu volumo in-16	2 =
Internacia Krestomatlo , elektis kaj tradukis D ^o KABE.	
Unu volumo in-16	1 50
Kastelo de Prelongo , romano originale verkita de D ^o VALLIENNE.	
Unu volumo in-16	4 =
Kiel ni plibeligos la vivon , originale verkita de SAĆULO.	
Unu volumo in-16, 20-paĝa	= 65
Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia , de A. GRABOWSKI.	
Unu volumo in-16	2 =
Kurso tutmonda , de E. GASSE.	
Unu volumo in-16	= 75

Librejo HACHETTE & K^o, 79, boul. Saint-Germain, PARIS.

La Avarulo , kvinakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de S. MEYER.	
Unu volumo in-16	75
La fundo de l' mizero , romano de SIEROŠEVSKI (VACLAV), tradukita de D ^o KABE.	
Unu volumo in-16	75
La interrompita kanto , romano de ORZESKO, tradukita de KABE.	
Unu volumo in-16	75
La kolorigisto aerveturanto , gaja rakonto, de GODINEAU	
Unu volumo in-16	30
La kvar Evangelioj , kunigitaj en unu rakonto, de Pastro LAISNEY.	
Unu volumo in-16	1 50
La nevo kiel onklo , triakta komedio de SCHILLER, tradukita de STEWART.	
Unu volumo in-16	1 »
Lernolibro de esperanta stenografio , de F. SCHNEEBERGER.	
Unu volumo in-16	1 »
Paĝoj el la Flandra literaturo , tradukitaj de D ^o SEYNAEVE kaj D ^o VAN MELCKEBEKE.	
Unu volumo in-16	1 50
Pola Antologio , elektita kaj tradukita de KABE.	
Unu volumo in-16	2 »
Poŝkalendaro Esperantista 1909.	
Unu volumo in-16	1 »
Poŝlibro internacia por aferistoj, turistoj, k. c. , de NORMAN.	
Unu volumo in-16 (<i>bindita</i>)	2 »
Pri unu speco de kurbaj linioj , von Prof. A. DOMBRÓVSKI.	
Unu volumo in-16	60
Rakontoj pri feinoj , de PERRAULT (Ch.), tradukitaj de S ^{ino} SARPY.	
Unu volumo in-16	1 »
Sub la neĝo , taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro, de J. J. PORCHAT, tradukita de J. BOREL.	
Unu volumo in-16, 144-paĝa	1 25
Tri unuaktaj komedioj , de A. v. KOTZEBUE, T. WILLIAMS, S ^{ino} M. HANKEL.	
Unu volumo in-16, 96-paĝa	1 »
Unua legolibro , de D ^o KABE.	
Unu volumo in-16	1 00
Verdaj Fajreroj , kolekto da versaĵoj de ROMANO FRENKEL.	
Unu volumo in-16	1 »
Verkaro , libro I ^a , de DEVJATNIN.	
Unu volumo in-16	2 »
Vojaĝo interne de mia ĉambro , de MAISTRE, tradukita de S. MEYER.	
Unu volumo in-16	75